

LA
REVUO

Internacia monata literatura gazeto

KUN LA KONSTANTA KUNLABORADO

de

D^{RO} L. L. ZAMENHOF

Aŭtoro de la lingvo Esperanto.

Junio 1907

ENHAVO

D^o L. L. Zamenhof : *La Rabistoj*. — Lozo : *Hagar en la dezerto*. — N. Kabanov : *Du poemoj de Maksimo Gorkij*. — H. Boucon : *La fremda junulino*. — C. Bicknell : *Sonĝo*. — H. Boucon : *Esperantujo*. — Nadina Kolowrat : *Morto kaj Vivo*. — Kabe : *Himno de Sara*. — D^o L. L. Zamenhof : *Respondoj*. — Bibliografio. — Kroniko.

Librejo HACHETTE KAJ K^o

79, Boulevard Saint-Germain, PARIS.

KAJ ĜIAJ KORESPONDANTOJ :

DANUJO, ANDR.-FRED HÖST & SÖN, Bredgade 35, KJÖBENHAVN.

GERMANUJO, ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, Prinzenstrasse, 93, BERLIN.

GRANDA BRITUJO, REVIEW OF REVIEWS, Mowbray House, Norfolkstreet, LONDON W

HISPANUJO, J. ESPASA, 579, Calle de las Cortes, BARCELONA.

ITALUJO, R. GIUSTI, 53, Via Vittorio Emanuele, LIVORNO.

RUSUJO, M. ARCT, 53, Nowy Swiat, WARSZAWA.

SVEDUJO, ESPERANTISTEN, 37, Surbrunnsgatan, STOCKHOLM.

(Revue mensuelle).

REDAKCIO

Ĉefa kunlaboranto. — D^{ro} LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF

Direktoro. — CARLO BOURLET

Administracia sekretario. — FÉLICIEEN DE MÉNIL

Redakcia sekretario. — HORACE HUET

Redaktoroj. — CAMILLE AYMONIER, RAOUL BRICARD,
D^{ro} LEONO ZAMENHOF.

Korespondantoj.

Algerio : MAURICE AUBERT. — *Aŭstrujo* : THEODOR ČEJKA, OTTO SIMON.
— *Anglujo* : H. BOLINGBROKE MUDIE. — *Belgujo* : RAYMOND VAN MELCKE-
BEKE. — *Bulgarujo* : OREŠKOV. — *Ĉilio* : LUIS E. SEPULVEDA CUADRA. —
Danujo : FR. DE SKEEL-GIÖRLING. — *Germanujo* : D^r JULIUS HANAUER — *Grek-
ujo* : E. DRAGOUMIS. — *Hispanujo* : VICENTE INGLADA ORS. — *Italujo* :
LUGI GIAMBENE. — *Litovujo* : A. DOMBROVSKI. — *Peruo* : EDUARDO F.
GARCIA. — *Polujo* : D^{ro} KAZIMIERZ BEIN. — *Rusujo* : I. OSTROVSKI. — *Sved-
ujo* : P. AHLBERG. — *Svisujo* : EDMOND PRIVAT. — *Unuigitaj Ŝtatoj* : EDWARD
K. HARVEY.

AVIZO

Ĉion koncernantan la Redakcion oni sendu al la jena adreso :

La Revuo, HACHETTE ET C^{ie}, 79, Boulevard St-Germain, Paris.

Nepresitajn manuskriptojn oni ne resendas.

La Redakcio konservas por si la rajton korekti laŭbezzone la manu-
skriptojn. Originalaj verkoj estos ĉiam prefere akceptitaj.

Rajto de represio kaj traduko de ĉiuj artikoloj estas rezervita.

ONI ABONAS

Francujo. — Librejo HACHETTE KAJ K^o, 79, boulevard Saint-Germain,
PARIS, unu numero 50 cent., jara abono Fr. 6
Danujo. — ANDR.-FRED. HÖST & SÖN, Bredgade, 35, KJÖBENHAVN,
unu numero 50 öre, jara abono Kr. 4,50
Germanujo kaj Aŭstrujo - Hungarujo. — ESPERANTO VERLAG MÖLLER
& BOREL, Prinzenstr., 95, BERLIN, unu numero 45 pfen., jara
abono M. 5
Granda Britujo kaj Kolonioj. — REVIEW OF REVIEWS, Norfolk street,
LONDON W. C., unu numero 6 penc., jara abono S. 6
Hispanujo. — J. ESPASA, 579, Calle de las Cortes, BARCELONA, jara
abono P. 8
Italujo. — R. GIUSTI, 53, Via Vittorio Emanuele, LIVORNO, unu numero
50 cent., jara abono L. 7
Rusujo. — M. ARCT, 53, Nowy Swiat, WARSZAWA, unu numero 25 kop.,
jara abono R. 2,80
Svedujo kaj Finnlando. — P. AHLBERG, 37, Surbrunnsgatan, STOCK-
HOLM, unu numero 50 öre, jara abono Kr. 4,50

Por la landoj, kie ne estas abonejo, sin turni al firmo

HACHETTE k. K^o en Paris.

Jara abono (por tiuj landoj). Fr. 7 »

Oni akceptas pagon de l'abono nur per poŝtmandato aŭ ĉekoj.

Glicerina DENTPASTO

Kiu ĝin uzis, tiu ĝin uzos.
GELLE FRÈRES, Paris.
La firmo korespondas Esperante.



MANUFACTURE FRANÇAISE D'ARMES & CYCLES DE SAINT-ÉTIENNE



POST RICEVO DE TRIDEK CENTIMOJ EN POŝTMARKOJ
ONI SENDAS AFRANKE

TARIF-ALBUMON

1000 PAĜOJ — 15,000 GRAVUROJ — PEZO 1 KILOG.

RUE DU LOUVRE, 42. — DEPONEJO EN PARIS — 42, RUE DU LOUVRE

ABONILO

Mi abonas unu jaron de « LA REVUO »
komencante de l' 1^a de..... 19.....

VOLU ADRESI LA GAZETON AL :

S^o.....

n^o..... Strato.....

Urbo..... Lando.....

Ĉi tie aldonitan vi trovos poŝtmandaton

da..... por la pago de la jara abono.

SUBSKRIBO :

Oni zorgu kaj legeble plenigu tiun abonilon kaj ĝin sendu kun la abonmono, al unu el la abonejoj montritaj sur la dua paĝo de l' kovrilo.

MALKARAJ ANONCOJ DE « LA REVUO »

Por esti agrablaj al niaj legantoj ni speciale difinis tiun lokon por demandoj, sciigoj, interkorespondadoj, laŭ tre malkara tarifo :

TARIFO

- 1° Premio al niaj abonantoj — Ĉiu abonanto de unu jaro povos dum la jaro, enpresigi 30 vortojn senpage (sendi kun la teksto unu el la banderoloj, sub kiuj oni ricevas la Gazeton).
 2° Nekomercaj anoncetoj (abonantoj aŭ ne) — 15 centimoj por 5 vortoj aŭ frakcio da 5 vortoj.
 3° Komercaj anoncetoj — 10 centimoj por ĉiu vorto

Sendi la tekston kun la responda mono al la Redakcio de

LA REVUO, librejo HACHETTE & K^o, 79, Boulevard Saint-Germain, PARIS

Oni akceptas nur francajn poŝmarkojn.

J. FIZE, au Pastissou, en BÉZIERS, Francujo. — Mi sendos cent malsimilajn poŝmarkojn el francaj kaj neerlandaj kolonioj al tiuj, kiuj sendos al mi cent malsimilajn poŝmarkojn el anglaj kolonioj, prefere malnovajn. — J. F.

JUNULO, 24-jara, Franco, lerninte la librotenanadon kaj daktilografion, petas oficon de skribisto. Ĉar li posedas la « Ateston pri kapableco », li povus fari korespondadon en Esperanto. Volu skribi al : P. PERRIN, 30, rue Nocard, S^e-MAURICE (Seine), Francujo.

ETIENNE BARNIER, boulevard de la République, VOIRON (Isère), Francujo, deziras interŝanĝi ilustritajn poŝkartojn kun ĉiulandaj samideanoj. Ĉiam tuj respondos.

TONKIN. — BURNIER CÉSAR, 18^e colonial, MOYCA Y, interŝanĝas poŝkartojn ilustritajn kun Geesperantistoj ĉiulandaj krom Francujo. Laŭ deziro, li sendos poŝmarkojn de Ĥinujo aŭ Tonkinujo.

JOHANNES NOA, stud. math., BONY, Germanujo, Wenzelgasse, 14 — deziras korespondadi kun alilandaj Geesperantistoj, (precipe gestudentoj), kiuj havas intereson por natursciencoj kaj matematiko. Li estas kolektanto de ŝtonoj, kreskaĵoj, ilustritaj kartoj, poŝmarkoj.

S^o KRJUĈKOV, ELISAVETPOL, Rusujo. — Mi petegas ĉiujn sciantajn samideanojn sciigi min pri jena : kian pezon povas levi en aeron birdo albatroso, kaj kiom da mono ĝi kostas en sia lando apudmara? — S^o K.

LÉON SAUVAGE, rue Saint-Ladre, DOULLENS (Somme), Francujo. — Mi plezure korespondus poŝtarte aŭ letere kun ĉiulandaj Gesamideanoj kaj ĉiam respondos akurate. Antaŭajn dankojn. — L. S.

Fino MAILLY, 85, rue de Rennes, PARIS. — Poŝtaj markoj malkare. Sendi mankantaron.

POR LA TRIA KONGRESO. — Ni petas, ke la Esperantistoj, kiuj venos al la Cambridge'a kongreso kaj poste vizitos Londonon, helpu nin festi niajn postkongresajn tagojn en Londono. — Tiuj, kiuj konsentas kanti aŭ deklami k. t. p., bonvolu tuj sendi al la suba adreso la nomon de tio, kion ili intencas prezenti, por ke ni povu aranĝi belan internacian programon. Ni poste sciigos tiujn, kies nomoj estos sur la programoj, kaj esperas, ke neniu ofendiĝos, se ni ne povos trovi lokon por ĉiuj alsenditaj nomoj. (La naciaj gazetoj esperantistaj bonvolu repressi tiun ĉi alvokon.) — Por la Londona Esp. Klubo: Ad. SCHAFER, 8, Gloucester Crescent, Regent's Park, LONDON N. W.

TARIFO DE L' REKLAMO DE « LA REVUO »

	Unu enpresaĵo	Almenaŭ 6 enpresaĵoj, ĉiu	Almenaŭ 12 enpresaĵoj, ĉiu
Plena paĝo.	Fr. : 400	Fr. : 75	Fr. : 50
1/2 da paĝo.	— 60	— 45	— 30
1/4 —	— 35	— 25	— 20
1/8 —	— 20	— 15	— 12
1/16 —	— 12	— 10	— 8

Sin turni al la Administracio de « La Revuo ».

Librejo HACHETTE & K^o, 79, Boulevard Saint-Germain, PARIS.

“ VIDU BLACKPOOL'ON KAJ VIVADU ! ”

BLACKPOOL

(ANGLUJO)

La plej bela Marborda sanigejo en la mondo !

Esperantistoj, kiuj ĉeestos la Trian Internacian Kongreson
en Cambridge (Anglujo), ne devas manki viziti **BLACKPOOL**.

Mejloj da vastaj asfaltitaj promenejoj ?

Sanigaj okcidentaj ventoj ?  Palacoj de amuzado ?
Nesuperita talento ĉe amuzajoj ?

« MIRINDAĴEJO APUD LA MARONDOJ »

*Sendu ilustritan poŝtkarton al S^o Charles NODEN, (Sekcie E.), Town Hall, BLACKPOOL,
por senpaga ekzemplero de bele ilustrita gvidlibro. — Skribu legeble.*

LINGVO INTERNACIA

Centra Organo de la Esperantistoj.

Eliranta la 15^{an} de ĉiu monato.

*La plej malnova el ĉiuj Esperantistaj Gazetoj,
fondita en 1895.*

ADMINISTRACIO :

Presa Esperantista Societo, 33, rue Lacépède, Paris.

JARA ABONO :

Sen Literatura Aldono Fr. 5 »
Kun Aldono 7,50

Specimena numero estas senpage ricevebla.

JUNA ESPERANTISTO

Monata Gazeto por Junuloj, Instruistoj kaj Esperanto-lernantoj.

Jara abono : Fr. 2,50

Administracio : PRESA ESPERANTISTA SOCIETO
33, rue Lacépède, PARIS

Specimena numero estas senpage ricevebla.

AUX FABRIQUES DE GENÈVE

Firmo fondita en 1885

137, Boulevard Sébastopol, PARIS

Telefono 145 78

Firmo E. COTTE


Telefono 145-78

MAUPOMÉ, Posteulo

HORLOGOJ

Poŝhorloĝoj el oro,
arĝento, ŝtalo
aŭ
speciala metala
kunfandajo
laŭ ĉiuj sistemoj
kaj grandoj
kaj
por ĉiuj prezoj

ŜTONORNAMOJ



Granda sortimento da kamengarnituroj
Vojaĝhorloĝoj

JUVELOJ

Brust- kaj
kol-ornamoj por
edziĝdonacoj.
Ringoj, butonoj,
diamantoj, perloj.
Ĉenoj
por viroj,
kolĉenoj
kun aŭ sen parringo

ORAĴOJ

Laŭ peto oni sendas ilustritan katalogon.

TERROT & K^o DIJON

Por la turismo, la vojaĝoj, la ekskursoj en montaro,

La Biciklotoj TERROT

estas nekonkurenceblaj!

Modeloj je 2, 3, 4, 6 kaj 10 rapidecoj, kun normala, retronormala aŭ levila pedalado.

Tri konkursoj de l' potenca franca Turing Klubo certigis la superecon de la Terrot'aj Biciklotoj, kiuj, ĉe ĉiuj tiuj konkursoj, ricevis la *UNUAN PREMION*.

La Motorbiciklo to TERROT

provizita je la mirinda malgranda motoro de H. kaj A. Dufaux, malpeza, senbrua kaj potenca, estas facilkondukebla kiel biciklo to.

La Haltigiloj TERROT

estas ĉiam la plej flekseblaj kaj la plej sendanĝerigaj.

Tre interesa kaj plena katalogo estas sendita laŭ peto.

MAGAZENOJ :

30, Avenue de la Grande-Armée, Paris
260, R. Judaïque, Bordeaux — 12, R. Gioffredo, Nice
1, Boul. d'Alsace, Cannes — 172, Av. de Saxe, Lyon —
11, Av. Colbert, Toulon — 3, Qu. Penthhièvre, Nantes.

HACHETTE & C^{ie}, 79, bd St-Germain, Paris

Kolekto de « LA REVUO »

**Por akiri perfektan stilon
Por superaj kursoj
Plene taŭgas**

Grammaire complète d'Esperanto

de CAMILLE AYMONIER

1 vol., in-8, 166-paĝa . . . Fr. 1,50



Esperanta Sintakso

de PAUL FRUICHTIER

1 vol., in-8, 80-paĝa . . . Fr. 1,50

LA RABISTOJ

Dramo

DE

FREDERIKO SCHILLER

(*Ŝiller.*)

AKTO DUA¹

SCENO UNUA.

FRANCISKO MOOR, *meditante, en sia ĉambro.*

FRANCISKO. — Ĝi daŭras por mi tro longe.... La doktoro trovas, ke li nun resaniĝos, — la vivo de maljunulo estas eterneco! Kaj nun mi havus liberan ebenan vojon, se ne estus tiu ĉi ĉagrena persistabulo da karno, kiu, simile al la sorĉista hundo en la fabeloj, baras al mi la vojon al miaj trezoroj.

Sed ĉu miaj projektoj devas sin klini sub la feran jugon de la meĥanismo? Ĉu mia alte fluganta spirito devas lasi alligi sin per ĉeno al la limaka irado de la materio? Forblovo de kandelero, kiu jam sen tio bruletas nur per la lastaj gutoj de sia oleo, — nenio pli ĝi estus.... Kaj tamen mi ne volus esti mem la farinto, por ke la homoj min ne ataku. Mi ne volus lin rekte mortigi, mi volus, ke li mem mortu. Mi volus fari kiel prudenta kuracisto, nur returnite. Ne bari al la naturo la vojon per laŭlarĝa streko, sed akceli ĝian propran iradon. Kaj ni ja havas la eblon plilongigi la kondiĉojn de la vivo, — kial do ni ne povus ankaŭ mallongigi ilin?

Filozofoj kaj medicinistoj instruas nin, kiel bonege la humora stato de la spirito akordiĝas kun la movoj de la materio. Artritaj sentadoj estas ĉiam akompanataj de malakordo de la meĥanikaj vibracioj, pasioj difektas la forton de la vivo, troŝargita spirito dispremas la korpon, en kiu ĝi loĝas.... Kiel do, sekve?... Se oni scius ebenigi al la morto tiun neglatan vojon al la kastelo de la vivo? pereigi la korpon per la spirito? Ha, ĝi estus originala faro! se oni povus tion ĉi efektivigi? Faro senkompara! Pripensu,

1. Vidu la numerojn 8 kaj 9.

Moor! Tio ĉi estus artaĵo, kiu meritus, ke vi estu ĝia elpensinto. Oni ja alkondukis la pretigadon de venenoj preskaŭ al la rango de bonorda scienco, kaj per eksperimentoj oni devigis la naturon, ke ĝi montru siajn limojn, tiamaniere, ke oni nun prikalkulas la batojn de la koro multajn jarojn antaŭe kaj oni diras al la pulso : ĝis tie kaj ne plu ! Ĉu oni ne devus ankaŭ tie ĉi provi siajn flugilojn ?

Kaj kiel mi devos nun aranĝi la laboron, por detrui la dolĉan, pacan konsenton inter la animo kaj ĝia korpo ? Kian specon de sentoj mi devos elekti ? Kiuj plej furioze atakas la floradon de la vivo ? — *Kolero* ? — tiu ĉi malsatega lupo tro rapide satiĝas. — *Zorgo* ? — tiu ĉi vermo mordetas tro malrapide. — *Malĝojo* ? — tiu ĉi aspido ŝoviĝas antaŭen tro maldiligente. — *Timo* ? — la espero ne permesas al ĝi tro multe ampleksi. — Kio ? — Ĉu tio ĉi estas jam ĉiuj ekzekutistoj de la homo ? Ĉu la batalilaro de la morto jam estas tute elĉerpita ?... (*Profunde meditante.*) Kiel ?... Nu ?... Kio ? Ne !... Ha ! (*Subite rektiĝante.*) *Teruro* ! Kion la teruro ne povas fari ? Kion povas fari prudento aŭ religio kontraŭ la glacia ĉirkaŭpreno de tiu ĉi giganto ?... Kaj tamen ? Se li ankaŭ al tiu ĉi atakego kontraŭstarus ? Se li... ? Ho, tiam donu vi al mi helpon, *ĉagrenego*, kaj vi, *pento*, infera Eŭmenido, fosanta serpento, kiu remaĉas sian manĝon kaj remanĝas sian propran ekskrementon, — eternaj detruantinoj kaj eternaj kreantinoj de sia veneno ! Kaj vi, krieganta *sinmemkulpigo*, kiu dezertigas sian propran domon kaj vundas sian propran patrinon. Kaj ankaŭ vi donu al mi vian helpon, bonfaraj gracioj mem, dolĉe ridetanta *estinteco*, kaj vi, grandajn trezorojn promesanta, floranta *estonteco*, montru al li en viaj speguloj la ĝojojn de la ĉielo, dum via forkuranta piedo elglitiĝas el liaj avidaj brakoj.... Tiel mi atakos, bato post bato, skuo post skuo, tiun ĉi kadukan vivon, ĝis venos la lasta el la anaro da furioj, la malespero !... Triumfo, triumfo ! La plano estas preta, — malfacila ĝi estis kaj eksterordinare arta, fidebla, certa... ĉar (*moke*) la tranĉilo de la analizanto trovos ja nenian poŝtesignon de vundo aŭ de detrua veneno. (*Decide.*) Bone do ! (*Hermano eniras.*) Ha ! *Deus ex machina* ! Hermano !

HERMANO. — Preta por servi al vi, sinjora moŝto !

FRANCISKO, *donas al li la manon.* — Kaj ne al maldankemulo vi servos.

HERMANO. — Mi havas pruvojn de tio ĉi.

FRANCISKO. — Vi havos pli, tre baldaŭ, tre baldaŭ, Hermano ! Mi havas ion por diri al vi, Hermano.

HERMANO. — Mi aŭskultas per mil oreloj.

FRANCISKO. — Mi konas vin, vi estas decidema homo, — soldata koro, haroj sur la lango! Mia patro vin tre ofendis, Hermano!

HERMANO. — La diablo min prenu, se mi tion ĉi forgesos!

FRANCISKO. — Tio ĉi estas la tono de viro! Venĝo konvenas al vira brusto. Vi plaĉas al mi, Hermano. Prenu tiun ĉi monujon, Hermano. Ĝi estus pli peza, se mi estus mastro.

HERMANO. — Tio ĉi estas ja mia ĉiama deziro, sinjora moŝto; mi vin dankas.

FRANCISKO. — Efektive, Hermano? ĉu vi efektive deziras, ke mi estu mastro? Sed mia patro havas en la ostoj cerbon de leono, kaj mi estas la pli juna filo.

HERMANO. — Mi dezirus, ke vi estu la pli maljuna filo, kaj ke via patro havu en la ostoj cerbon de ftiza knabino.

FRANCISKO. — Ha! Kiel tiu ĉi pli maljuna filo vin tiam rekom-pencus, kiel li vin levus en la lumon el tiu ĉi malnobla polvo, kiu tiel malmulte harmonias kun via spirito kaj nobeleco! Tiam vi tuta, kiel vi nun staras, estus kovrita per oro, kaj per kvar ĉevaloj vi brue veturus tra la stratoj, certe, kredu al mi! Sed mi forgesas, pri kio mi volis paroli kun vi. Ĉu vi jam forgesis, Hermano, la fraŭlinon von Edelreich?

HERMANO. — Al mil diabloj! Kial vi rememorigas min pri ĉi tio?

FRANCISKO. — Mia frato forkaptis ŝin devi.

HERMANO. — Li tion ĉi pentos!

FRANCISKO. — Ŝi forrifuzis vian amon. Ŝajnas al mi, ke li eĉ ĵetis vin malsupren de la ŝtuparo.

HERMANO. — Por tio mi enĵetos lin en la inferon.

FRANCISKO. — Li diris, ke oni rakontas al si en la orelojn, ke vi estis farita inter la viando kaj kreno, kaj ke via patro neniam povis ekrigardi vin sen tio, ke li batus sin en la bruston kaj ĝemus: « Dio indulgu min pekulon! »

HERMANO, *furioze*. — Pro la tuta fajro de la infero, silentu!

FRANCISKO. — Li konsilis al vi, ke vi vendu per aŭkecio vian dokumenton de nobeleco kaj vi por tio ĉi lasu fliki al vi viajn ŝtrumpojn.

HERMANO. — Per ĉiuj diabloj! mi elgratos al li per la ungoj la okulojn.

FRANCISKO. — Kio? Vi koleriĝas? Kiel vi povas koleri kontraŭ li? kion malbonan vi povas fari al li? Kion tia rato povas fari kontraŭ leono? Via kolero nur dolĉiĝos al li la triumfon. Vi nenion povas

fari krom kunbati viajn dentojn kaj elverŝi vian furiozon sur sekan panon.

HERMANO, *piedbatas la plankon*. — Mi disfrotos lin al polvo.

FRANCISKO, *frapas lin sur la ŝultron*. — Fi, Hermano! vi estas kavaliro. Vi ne devas permesi, ke la malhonoro restu sur vi. Vi ne devas ellasi la fraŭlinon, ne, pro ĉio en la mondo vi ne devas tion ĉi fari, Hermano! Al ĉiuj diabloj! mi farus la plej ekstremajn provojn, se mi estus sur via loko.

HERMANO. — Mi ne ripozos, antaŭ ol mi ambaŭ miajn malamatojn metos sub la teron.

FRANCISKO. — Ne tiel perforte, Hermano! Venu pli proksimen... vi havos Amalion!

HERMANO. — Tion ĉi mi devas, spite al la diablo! Tion ĉi mi devas.

FRANCISKO. — Vi ŝin havos, mi diras al vi, kaj vi havos ŝin el mia mano. Alproksimiĝu, mi diras... vi eble ne scias, ke Karolo estas jam kvazaŭ senheredigita?

HERMANO, *alproksimiĝante*. — Nekompreneble! ĝi estas la unua vorto, kiun mi aŭdas pri tio.

FRANCISKO. — Estu trankvila kaj aŭskultu plue! Alian fojon vi aŭdos pli pri ĉi tio, — jes, mi diras al vi, de dek-unu monatoj li estas kiel ekzilita. Sed la maljunulo jam bedaŭras la trorapidan paŝon, kiun li tamen, (*ridante*) ŝajnas al mi, ne mem faris. Ankaŭ la fraŭlino Edelreich atakas lin ĉiutage per siaj riproĉoj kaj plendoj. Pli aŭ malpli frue li lasos serĉi lin en ĉiuj anguloj de la mondo, — kaj se li lin trovos, tiam bonan nokton, Hermano! Vi tiam povos tre humile teni al li la kaleŝon, kiam li veturos kun ŝi al la preĝejo por edziĝi.

HERMANO. — Mi lin sufokos antaŭ la Krucifikso.

FRANCISKO. — La patro baldaŭ fordonos al li la estrecon kaj vivos ripoze en siaj kasteloj. Tiam la fiera flamiĝulo havos la kondukilojn en la manoj, tiam li mokos siajn malamantojn kaj enviantojn, — kaj mi, kiu volis fari vin grava, granda homo, mi mem, Hermano, devos, profunde klinita antaŭ la sojlo de lia pordo....

HERMANO, *flamiĝe*. — Ne, kiel mia nomo estas Hermano, vi ne devos! dum ankoraŭ almenaŭ unu fajrero da prudento briletos en tiu ĉi cerbo, tion ĉi vi ne devos!

FRANCISKO. — Vi tion malhelpos? Ankaŭ al vi, mia kara Hermano, li sentigos sian skurĝon, li kraĉos al vi en la vizaĝon, kiam

li renkontos vin en la strato, kaj tiam ve al vi estos, se vi movos viajn ŝultrojn aŭ faros malkontentan mienon, — vidu, tiele staras la afero de via aspirado pri la fraŭlino, viaj espero, viaj projektoj.

HERMANO. — Diru al mi, kion mi devas fari?

FRANCISKO. — Aŭskultu do, Hermano! Por ke vi vidu, kiel mi, kiel honesta amiko, zorgas pri via sorto, — iru, surmetu aliajn vestojn, faru vin tute nerekebla, lasu raportoj pri vi al la maljunulo, diru, ke vi venas rekte el Bohemujo, ke vi partoprenis kun mia frato en la batalo apud Prago, ke vi vidis lian morton sur la loko de batalo....

HERMANO. — Ĉu oni kredos al mi?

FRANCISKO. — Ho ho! pri tio lasu min zorgi! Prenu tiun ĉi paketon. En ĝi vi trovos mian komision detale kaj ankaŭ dokumentojn, kiuj la dubon mem faros kredanta. Nun penu nur malaperi nevidate! Saltu tra la malantaŭa pordo en la korton, de tie trans la muron de la ĝardeno, — la katastrofon de tiu ĉi tragi-komedio lasu al mi!

HERMANO. — Kaj ĝi estos : vivu la nova sinjoro, Francisko de Moor!

FRANCISKO, *karesas al li la vangojn*. — Kiel ruza vi estas! Ĉar, vi vidas, tiamaniere ni atingos ĉiujn celojn per unu fojo kaj baldaŭ Amalio ĉesos esperi pri li. La maljunulo kulpigos sin pri la morto de sia filo kaj — li estas malsana, — ŝanceliĝanta konstruaĵo ne bezonas tertremon, por renversiĝi, — li ne supervivos la sciigon.... Tiam mi estas lia sola filo, Amalio perdis siajn apogojn kaj fariĝas ludilo de mia volo.... Tiam vi povas facile prezenti al vi... per unu vorto, ĉio iros laŭ deziro. Sed nur ne reprenu vian vorton.

HERMANO. — Kion vi diras? (*Ĝojege.*) Pli vere kuglo rekuros en la tubon de la pafilo kaj dancos en la internaĵo de sia pafanto, — fidu min! Lasu min nur agi. Adiaŭ!

FRANCISKO, *postkriante al li*. — La rikolto apartenos al vi, kara Hermano! (*Sola.*) Kiam la bovo entiris la veturilon kun greno en la grenejon, tiam la besto devas kontentiĝi kun fojno! Vi ricevos stalistinon, sed ne Amalion! (*Foriras.*)

SCENO DUA.

Dormoĉambro de la maljuna Moor.

LA MALJUNA MOOR, *dormante en apogseĝo*. AMALIO.

AMALIO, *mallaŭte enirante*. — Malbrue, malbrue! li dormetas. (*Ŝi stariĝas antaŭ la dormanto*.) Kiel bela, kiel honorinda! honorinda, kiel oni pentras la sanktulojn. Ne, mi ne povas vin koleri! Blankhara kapo, vin mi ne povas koleri! Dormu trankvile, vekigu gaje, mi sola iros kaj suferos.

MALJUNA MOOR, *sonĝante*. — Mia filo! mia filo! mia filo!

AMALIO, *prenas lian manon*. — Aŭdu, aŭdu! Lia filo estas en liaj sonĝoj.

MALJUNA MOOR. — Ĉu vi estas ĉi tie? ĉu efektive vi? Ha, kiel mizere vi vidiĝas! Ne rigardu min per tiu ĉi malĝojega rigardo! mi estas jam sufiĉe mizera.

AMALIO, *vekas lin rapide*. — Vekiĝu, kara maljunulo! Vi nur sonĝas. Rekonsciiĝu!

MALJUNA MOOR, *duone vekiginta*. — Li ne estis ĉi tie? ĉu mi ne premis liajn manojn? Malbona Francisko! ĉu vi deziras eĉ el miaj sonĝoj lin elŝiri?

AMALIO. — Vi rimarkas, Amalio?

MALJUNA MOOR, *revigliĝas*. — Kie li estas? Kie mi estas? Vi ĉi tie, Amalio?

AMALIO. — Kiel vi vin sentas? Vi havis sanigan dormon.

MALJUNA MOOR. — Mi sonĝis pri mia filo. Kial mi ne daŭrigis sonĝi? Eble mi ricevus pardonon el lia buŝo.

AMALIO. — Anĝeloj ne koleras, — li vin pardonas. (*Ŝi prenas lian manon malĝoje*.) Patro de mia Karolo, mi vin pardonas.

MALJUNA MOOR. — Ne, mia filino! Tiu ĉi morta koloro de via vizaĝo kondamnas la patron. Malfeliĉa knabino! Mi senigis al vi la ĝojojn de via juneco, — ho, ne malbenu min!

AMALIO, *karese kisas lian manon*. — Vin?

MALJUNA MOOR. — Ĉu vi konas tiun ĉi portreton, mia filino?

AMALIO. — De Karolo!

MALJUNA MOOR. — Tian vidiĝon li havis, kiam li komencis sian dek-sesan jaron. Nun li estas alia.... Ho, furioza mordado estas en mi interne.... Tiu ĉi moleco de la trajtoj fariĝis indigno, tiu ĉi rideto fariĝis malespero. Ne vere, Amalio? Ĝi estis en lia tago de

naskiĝo, en la jasmena laŭbo, vi lin pentris? Ho, mia filino! Via amo tiel feliĉigis min.

AMALIO, *ĉiam rigardante la portreton.* — Ne, ne! Ĝi ne estas li. Per Dio, ĝi ne estas Karolo. Ĉi tie, ĉi tie. (*Montrante la koron kaj la frunton.*) Tiel tuta, tiel alia! La pala kolorilo ne sufiĉas, por kopii la ĉielan spiriton, kiu regis en lia fajra okulo. For kun ĝi! Ĝi estas tiel homa! Mi estis fuŝistino.

MALJUNA MOOR. — Tiu ĉi bonkora, varmiga rigardo, — se li starus antaŭ mia lito, tiam mi vivus en la morto mem! Neniam, neniam mi mortus!

AMALIO. — Neniam, neniam vi mortus? Ĝi estus salto, kiel oni saltas de unu penso al alia pli bela, — tiu ĉi rigardo lumus al vi trans la tombo; tiu ĉi rigardo portus vin super la stelojn.

MALJUNA MOOR. — Estas malfacile, estas malĝoje! Mi mortas, kaj mia filo Karolo ne estas ĉi tie, — mi estas portata en la tombon, kaj li ne ploras super mia tombo! Kiel dolĉe estas esti enlulata en la dormon de la morto per la preĝo de filo, — ĝi estas lulila kanto.

AMALIO, *reve.* — Jes, dolĉa, ĉiele dolĉa ĝi estas, esti enlulata en la dormon de la morto per kanto de amato, — eble oni ankaŭ en la tombo daŭrigas ankoraŭ sonĝi, — longa, eterna, senfina sonĝo pri Karolo, ĝis oni eksonigas la sonorilon de reviviĝo... (*Rektiĝante, ravite.*) kaj de nun en liaj brakoj por eterne. (*Paŭzo. Ŝi iras al la fortepiano kaj ludas.*)

Ĉu Hektoro volas senrevene
Iri tien, kie kolerplene
Pro Patroklo buĉas la venĝanto?
Kiu do instruos vian filon
Timi diojn, uzi batalilon.
Se por ĉiam kovros vin la Ksanto?

MALJUNA MOOR. — Bela kanto, mia filino. Vi devos ĝin ludi al mi, antaŭ ol mi mortos.

AMALIO. — Ĝi estas la disiĝo de Andromaho kaj Hektoro. — Karolo kaj mi ofte kantadis ĝin kun akompano de liuto. (*Ŝi ludas plue.*)

Karulin', haltigu vian ploron!
Al batalo lasu for Hektoron:
Vokas lin honoro de Pergamo.
Pro patruj' atendas min pereo,
Sed post glora mort', en Elizeo
Por vi ĉiam daŭros mia amo.

(*Danielo eniras.*)

DANIELO. — Ekstere atendas homo. Li petas, ke oni enlasu lin al vi; li diras, ke li havas gravan sciigon por vi.

MALJUNA MOOR. — Por mi nur unu afero en la mondo estas grava, vi tion scias, Amalio. Ĉu ĝi estas malfeliĉulo, kiu bezonas mian helpon? Li ne foriru de ĉi tie kun ĝemado.

AMALIO. — Se ĝi estas almozulo, li rapide venu supren.

(*Danielo foriras.*)

MALJUNA MOOR. — Amalio, Amalio, indulgu min!

AMALIO, *ludas plue.* —

Jam ne sonas via batalilo,
Orfe kuŝos ruste la armilo,
Mortos for la gento de Priamo!
Vi foriros, kien lum' ne venas,
La Kocit' sin tra l'dezertoj trenas, —
En la Leto dronos via amo.

Ĉiu mia penso kaj prefero
Dronos en la Leto sub la tero,
Sed ne dronos am' de mia koro!
Aŭdu! Jam li vokas min sovaĝe. —
Ĉesu plori, tenu vin kuraĝe!
Ne, ne dronos amo de Hektoro!

(*Francisko, Hermano maskita, Danielo.*)

FRANCISKO. — Jen estas la homo. Li diras, ke teruraj sciigoj vin atendas. Ĉu vi povas ilin aŭskulti?

MALJUNA MOOR. — Tia sciigo povas esti nur unu. Alproksimiĝu, mia amiko, kaj ne indulgu min! Donu al li pokalon da vino!

HERMANO, *per ŝanĝita voĉo.* — Via sinjora moŝto! Ne koleru malriĉan homon, se li kontraŭ sia volo traboros vian koron. Mi estas fremdulo en tiu ĉi lando, sed vin mi konas tre bone, vi estas la patro de Karolo de Moor.

MALJUNA MOOR. — De kie vi tion ĉi scias?

HERMANO. — Mi konis vian filon.

AMALIO, *vivece.* — Li vivas? li vivas? Vi lin konas? kie li estas? kie, kie? (*Volas forkuri.*)

MALJUNA MOOR. — Vi scias pri mia filo?

HERMANO. — Li studis en Lepsiko. De tie li komencis migradi, mi ne scias kiel malproksime. Li travagis Germanujon ĉirkaŭe kaj, kiel li diris al mi, kun nekovrita kapo, kaj li almoze elpetadis al si

panon antaŭ la pordoj. Kvin monatojn poste komenciĝis denove la abomena milito inter Prusujo kaj Aŭstrujo, kaj ĉar li jam nenion en la mondo povis esperi, tial la sonoj de la venka tamburo de Frederiko fortiris lin Bohemujon. Permesu al mi, li diris al la granda Ŝverinido, ke mi mortu per la morto de herooj, — mi ne havas plu patron!

MALJUNA MOOR. — Ne rigardu min tiel, Amalio!

HERMANO. — Oni donis al li standardon. Li aliĝis al la venka flugo de la Prusoj. La sorto faris, ke ni ambaŭ kuŝis sub unu tendo. Li multe parolis pri sia maljuna patro kaj pri pli bonaj pasintaj tagoj kaj pri detruitaj esperoj... niaj okuloj estis plenaj de larmoj.

MALJUNA MOOR, *kaŝas sian kapon en la kusenon*. — Silentu, ho silentu!

HERMANO. — Ok tagojn poste estis la varmega batalo apud Prago. Mi povas diri al vi, via filo sin tenis, kiel brava batalisto. Li faris mirindaĵojn antaŭ la okuloj de la armeo. Kvin regimentoj devis anstataŭi unu la alian, sed li staris. Fajraj kugloj faladis dekstre kaj maldekstre, sed via filo staris. Unu kuglo frakasis al li la dekstran manon, via filo prenis la standardon en la maldekstran, kaj li staris.

AMALIO, *ravite*. — Hektoro, Hektoro! Ĉu vi aŭdas? li staris!

HERMANO. — Mi renkontis lin en la vespero de la batalo, falintan sub la fajfado de kugloj; per la maldekstra mano li estis retenanta la torente elfluantan sangon, la dekstran li enŝovis en la teron: « Frato! — li ekkriis al mi, — kuras la famo, ke la generalo antaŭ unu horo falis ». — « Li falis, — mi diris, — kaj vi? » — « Nu, kiu estas brava soldato, — li ekkriis kaj liberigis sian maldekstran manon, — tiu sekvu sian generalon, kiel mi! ». Tuj li elspiris sian grandan animon.

FRANCISKO, *kolerege ekpaŝante kontraŭ Hermanon*. — Ho, la morto enŝlosu vian malbenitan langon! Ĉu vi venis ĉi tien, por doni al nia patro la baton de la morto? Patro! Amalio! Patro!

HERMANO. — Ĝi estis la lasta volo de mia mortanta kamarado. « Prenu tiun ĉi glavon, — li diris agoniante, — transdonu ĝin al mia maljuna patro; la sango de lia filo algluiĝis al ĝi, li estas venĝita, li ĝoju! Diru al li, ke lia malbeno pelis min al la batalo kaj morto, ke mi finis mian vivon en malespero! » Lia lasta ĝemo estis « Amalio ».

AMALIO, *kiel vekita el morta dormo*. — Lia lasta ĝemo estis Amalio!

MALJUNA MOOR, *terure kriante kaj elŝirante at si la harojn*. — Mia malbeno enpelis lin en la morton! li finis sian vivon en malespero!

FRANCISKO, *vagante tra la ĉambro*. — Ho, kion vi faris, patro! Mia Karolo, mia frato!

HERMANO. — Jen estas la glavo kaj jen estas ankaŭ portreto, kiun li samtempe elprenis el sur la brusto. Ĝi similas perfektege tiun ĉi fraŭlinon. Ĉi tion al mia frato Francisko, li diris, — mi ne scias, kion li volis diri per ĉi tio.

FRANCISKO, *kvazaŭ tre mirigita*. — Al mi? la portreton de Amalio? Al mi?

AMALIO, *kolerege alpaŝante al Hermano*. — Malnobla, subaĉetita trompanto! (*Kaptas lin furioze ĉe la brako.*)

HERMANO. — Mi ne estas trompanto, moŝto fraŭlino. Rigardu mem, ĉu ĝi ne estas via portreto, — kredeble vi mem ĝin donis al li.

FRANCISKO. — Per Dio, Amalio, ĝi estas via portreto! Ĝi estas efektive via!

AMALIO, *redonas al li la portreton*. — Mia, mia! Ho, ĉielo kaj tero!

MALJUNA MOOR, *kriante kaj gratante al si la vizaĝon*. — Ho ve, ho ve! Mia malbeno alpelis lin al la morto! pereis en malespero!

FRANCISKO. — Kaj li memoris pri mi en la lasta malfacila horo de la mortado, pri mi! Anĝela animo, — kiam la nigra standardo de la morto jam bruas super li... pri mi!...

MALJUNA MOOR, *balbutante*. — Mia malbeno lin pelis al la morto, pereis mia filo en malespero!

HERMANO. — Mi ne povas elteni tian malĝojegon. Adiaŭ, maljuna sinjoro! (*Mallaŭte al Francisko.*) Ho, kial vi tion ĉi faris, sinjoro? (*Rapide foriras.*)

AMALIO, *saltleviĝante postkrias al li*. — Restu! restu! Kio estis liaj lastaj vortoj?

HERMANO, *haltante en la pordo*. — Lia lasta ĝemo estis Amalio. (*Foriras.*)

AMALIO. — Lia lasta ĝemo estis Amalio! Ne! vi ne estas trompanto! Sekve ĝi estas vero, vero, — li mortis, li mortis! (*Vagas ŝanceliĝante kaj falas.*) mortis! Karolo mortis!

FRANCISKO. — Kion mi vidas! Kio estas tie sur la glavo? skribite per sango — « Amalio »!

AMALIO. — De li?

FRANCISKO. — Ĉu mi bone vidas aŭ mi sonĝas? Jen per sanga skribo : « Francisko, ne forlasu mian Amalion ». Vidu do, vidu do! Kaj sur la alia flanko : « Amalio! vian ĵuron nuligis la ĉiopova

morto ». Ĉu vi nun vidas, ĉu vi vidas? li skribis ĉi tion per rigid-iganta mano, li skribis ĉi tion per la varma sango de sia koro, li skribis ĝin sur la solena rando de la eterneco! Lia spirito prokrastis sian forflugon, por interligi ankoraŭ Franciskon kaj Amalion.

AMALIO. — Sankta Dio! Ĝi estas lia mano! Li neniam min amis! (*Foriras rapide.*)

FRANCISKO, *piedobatante la plankon.* — Al la diablo! mia tuta arto rompiĝas sur tiu ĉi obstina kapo!

MALJUNA MOOR. — Ho ve! ho ve! Ne forlasu min, mia filino! Francisko, Francisko, redonu al mi mian filon!

FRANCISKO. — Kiu donis al li la malbenon? Kiu pelis sian filon al batalo, morto kaj malespero? Ho, li estis anĝelo, juvelo de la ĉielo. Malbeno al liaj mortigintoj! Malbeno, malbeno al vi mem!

MALJUNA MOOR, *batas per la pugno sian bruston kaj frunton.* — Li estis anĝelo, juvelo de la ĉielo! Malbeno, malbeno, pereco, malbeno al mi mem! Mi estas patro, kiu mortigis sian grandan filon. Min li amis ĝis la morto! Por venĝi pro mi, li kuris al batalo kaj morto! Ho, mi, monstro! monstro! (*Furiozas kontraŭ si mem.*)

FRANCISKO. — Li estas for, kion nun helpas tro malfruaj plendoj? (*Sarkasme ridas.*) Estas pli facile mortigi, ol revivigi. Vi neniam revenigos lin el lia tombo.

MALJUNA MOOR. — Neniam, neniam, neniam mi revenigos lin el lia tombo! For, perdita por ĉiam! Kaj vi ellogis de mi la malbenon, vi, vi.... Redonu al mi mian filon!

FRANCISKO. — Ne incitu mian koleron! Mi forlasos vin en la morto!

MALJUNA MOOR. — Monstro! Monstro! Redonu al mi mian filon! (*Satleviĝas de la seĝo kaj volas kapti Franciskon ĉe la gorĝo, sed tiu ĉi lin reĵetegas.*)

FRANCISKO. — Senfortaj ostoj! Vi kuraĝas.... Mortu! Malesperu! (*Foriras.*)

MALJUNA MOOR. — Mil malbenoj persekutu vin! Vi ŝtelis al mi mian filon el la brakoj. (*Ĵetas sin malespere tien kaj reen en la seĝo.*) Ho ve, ho ve! Malesperi kaj ne morti! Ili forkuras, ili forlasas min ĉe la morto, miaj bonaj anĝeloj forkuras de mi, ĉiuj sanktuloj forkuras de la malvarma griza mortiginto. Ho ve, ho ve! Ĉu neniu volas teni al mi la kapon, neniu volas liberigi la agoniantan animon? Neniom da filoj, neniom da filinoj, neniom da amikoj! Nur

homoj... neniu volas?... Sola... forlasita... Ho ve, ho ve! Malesperi kaj tamen ne morti!

(*Amalio, kun postploraj okuloj.*)

MALJUNA MOOR. — Amalio! sendito de la ĉielo! Ĉu vi venas, por forliberigi mian animon?

AMALIO, *per pli kvieta tono.* — Vi perdis belegan filon.

MALJUNA MOOR. — Vi volas diri « mortigis ». Ŝargita per tiu ĉi atesto mi alpaŝos al la juĝa seĝo de Dio.

AMALIO. — Ne, ne, malfeliĉa maljunulo! La ĉiela Patro revokis lin al si. Ni estus tro feliĉaj en tiu ĉi mondo. Supre, supre super la sunoj, ni lin revidos denove.

MALJUNA MOOR. — Revidi, revidi! Glavo tranĉos mian animon, kiam mi vidos lin inter la sanktuloj; meze en la ĉielo tremigos min teruroj de la infero! ĉe la rigardado de la eterneco frakasados min la rememoro, ke mi mortigis mian filon!

AMALIO. — Ho, per sia rideto li forigos la doloran rememoron el via animo! Estu gaja, kara patro! mi estas tute gaja. Ĉu li ne kantis jam al la ĉielaj aŭskultantoj la nomon Amalio sur la serafa harpo, kaj la ĉielaj aŭskultantoj dolĉe ĝin ripetis? Lia lasta ĝemo estis ja Amalio! Ĉu lia unua ĉiela voko ne estos Amalio?

MALJUNA MOOR. — Ĉiela konsolo fluas el viaj lipoj! Li ridetos al mi, vi diras? pardonos? Vi devas resti apud mi, amatino de mia Karolo, kiam mi estos mortanta.

AMALIO. — Morti estas flugi en liajn brakojn. Feliĉa vi estas! Enviinda vi estas. Kial tiuj ĉi ostoj ne estas putraj? kial tiuj ĉi haroj ne estas grizaj? Ve al mi pro miaj fortoj de juneco! Kun ĝojo mi akceptus vin, vi, sensuka maljuneco, kiu estas pli proksima al la ĉielo kaj al mia Karolo!

(*Francisko eniras.*)

MALJUNA MOOR. — Aliru, mia filo! Pardonu min, se mi antaŭe estis tro kruela kontraŭ vi! Mi ĉion al vi pardonas. Mi tiel forte dezirus fordoni mian animon en paco.

FRANCISKO. — Ĉu vi jam sufiĉe ploris pri via filo? Kiom mi vidas, vi havas nur unu filon.

MALJUNA MOOR. — Jakobo havis dek-du filojn, tamen pri sia Jozefo li ploris per sangaj larmoj.

FRANCISKO. — Hm!

MALJUNA MOOR. — Iru, prenu la Bibliion, mia filino, kaj legu al mi la historion pri Jakobo kaj Jozefo! Ĝi ĉiam tiel kortuŝadis min, kvankam mi tiam ne estis ankoraŭ Jakobo.

AMALIO. — Kiun lokon mi legu al vi? (*Prenas la Biblion kaj jolias.*)

MALJUNA MOOR. — Legu al mi pri la malĝojego de la perdinto, kiam li ne trovis Jozefon inter siaj infanoj kaj vane atendadis lin en la mezo de siaj dek-unu filoj, kaj lian plendan kanton, kiam li eksciis, ke lia Jozefo malaperis por ĉiam.

AMALIO, *legas*. — « Tiam ili prenis la veston de Jozefo, kaj ili buĉis kapron kaj trempis la veston en la sangon kaj sendis la makulitan veston kaj alportigis ĝin al sia patro kaj dirigis : tion ĉi ni trovis, — rigardu, ĉu ĝi estas la vesto de via filo, aŭ ne? » (*Francisko subite foriras.*) « Sed li ĝin rekonis kaj diris : ĝi estas la vesto de mia filo, kruela besto lin formanĝis, sovaĝa besto disŝiris Jozefon. »

MALJUNA MOOR, *refalas sur la kusenon*. — Sovaĝa besto disŝiris Jozefon!

AMALIO, *legas plue*. — « Kaj Jakobo disŝiris siajn vestojn kaj metis sakon ĉirkaŭ siajn lumbojn, kaj li funebriis pro sia filo longan tempon, kaj ĉiuj liaj filoj kaj filinoj penis lin konsoli; sed li ne lasis sin konsoli kaj diris : kun malĝojo mi malsupreniros.... »

MALJUNA MOOR. — Ĉesu, ĉesu! Al mi fariĝas tre malbone.

AMALIO, *alsaltas, faliginte la libron*. — Helpu ĉielo! Kio ĝi estas?

MALJUNA MOOR. — Ĝi estas la morto!... Nigra... naĝas... antaŭ miaj... okuloj... mi vin petas... voku la pastron... li min komuniu... Kie estas... mia filo Francisko?

AMALIO. — Li forkuris! Dio nin kompatu!

MALJUNA MOOR. — Forkuris... forkuris de la lito de la mortanto?... kaj ĉi tio estas ĉio, ĉio... de du infanoj plenaj de espero.... Vi ilin donis.... Vi ilin prenis.... Via nomo estu....

AMALIO, *kun subita ekkrio*. — Mortis! Ĉio mortis! (*Foriras malspere.*)

FRANCISKO, *ensaltas kun ĝojo*. — Mortis, ili krias, mortis! Nun mi estas mastro. En la tuta kastelo oni kriegas, ke li mortis. Tamen eble li nur dormas? Certe, ha certe! Vere ĝi estas tia dormo, kiun neniam sekvas la voko « bonan tagon », — dormo kaj morto estas nur du dunaskitoj. Ni interŝanĝu do iom la nomojn! Brava, bona dormo, ni nomos vin morto! (*Li alpremas al la maljunulo la okulojn.*) Kiu nun venos kaj kuraĝos voki min al juĝo? aŭ diri al mi en la vizaĝon : vi estas kanajlo! For do tiun ŝarĝan maskon de kvieteco kaj virto! Nun vi vidos la nudan Franciskon, kaj teruro vin kaptos! Mia patro superŝutadis siajn postulojn per sukero,

faris el sia posedaĵo familian rondeton, li sidadis kun afabla rideto antaŭ la pordo kaj salutadis ĉiujn kiel fratojn kaj infanojn. Miaj brovoj pendos super vi kiel fulmotondraj nuboj, mia sinjora nomo sin portados super tiuj ĉi montoj kiel minaca kometo, mia frunto estos via barometro! Li karesadis la nukon, kiu obstine sin levis kontraŭ li. Sed mi ne amas rideti kaj karesi. Mi hakos al vi la akrajn spronojn en la karnon, kaj mi uzos la senkompatan skurĝon. En mia posedaĵo mi alkondukos al tio, ke terpomoj kaj malforta biero fariĝos regalaĵo por festoj, kaj ve al tiu, kiu renkontiĝos al miaj okuloj kun plenaj kaj ruĝaj vangoj! Paleco de malriĉeco kaj de sklava timo estas mia amata koloro; en tiun ĉi livreon mi vin vestos. (*Li foriras.*)

El germana lingvo tradukis

(*Daŭrigota.*)

LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF.

HAGAR EN LA DEZERTO

DE

KORNEL UJEJSKI.

Sub suna brulego mi staras sen movo.
Ĉirkaŭe — dezerto; al Vi, ho Jehovo,
Mi preĝas kun voĉo de plor',
Fandiĝu sur nin la ĉiel' fajrigita,
Ekfrapu la fontoj el monto granita,
Kaj sablo kovriĝu per flor'!

Ĉu iam, Jehov', al mi antaŭ la morto,
Hebronon permesos rigardi la sorto
Kaj hejmon de l' mastro, ho Di' ?
Ĉu iam, eĉ vivo se estos savita,
Sub tendo mi dormos de li dorlotita
Kaj bruton mi gardos por li?

Jam vestoj defalas, nudiĝas la kaloj,
Rimenoj diskrevas sur niaj sandaloj
Kaj filo jam mortas de l' sek'!
Mi amis, ho Dio, kaj estis amata,
Feliĉa — kaj prave mi estas punata
Sed filo ja estas sen pek'!

Kaj kiam la fajra ventego ekblovas
Kaj cindrajn nubegojn minace alŝovas,
Izmael kliniĝas al ter'.
Al vi tiam, Dio, rigardojn mi sendas
Kaj filon per korpo mi nuda defendas
Por savi de l' fajra infer'!

Kaj ĉiam singardan dum nokta dormado
 Min ofte ekvekas sovaĝa kriado :
 Gazelon sufokas rabul'!
 Ĉirkaŭe — ŝakaloj, dezerto senfina....
 Sed bestoj forkuras, ĉar flamo tigrina
 El mia rebrilas okul'!

Kaj ofte sur blanka skeleto kamela
 Sovage rigardas vizaĝo malhela :
 Ĝi estas migrulo sen spir'!
 Aŭ nin rimarkinte, tre ofte vulturo
 Dezerton trafendas per krio terura,
 Al freŝa vokante akir'!

Kaj kiam li dormas, mi portas.... Ho Dio
 Izmael ektremis, li falas kun krio
 Kaj iri ne povas jam pli!
 Kaj buŝon malfermis. Ho granda Sinjoro,
 Aperu rapide do Via favoro!
 Vi granda, Vi forta, Vi Di'!

Jehovo, Jehovo, li ploras, li ĝemas
 Kaj buŝon brulantan al mia alpremas
 Kaj fajron elspiras per ĝi!
 Por voĉo, por mia, ĉu mortis ĉielo?
 Jehovo, la roson! Moliĝu kruelo!
 Guteton de l' pluvo por ni!

El pola lingvo tradukis

Lozo.

DU POEMOJ DE MAKSIMO GORKIJ

I. — La Ventegbirdo.

Super griza marsupraĵo
Vento nubojn ekkolektas.
Inter nuboj kaj la maro
Ventegbird' fiere flugas,
Je la nigra fulm' simila.

Ondon per flugil' tuŝante
Al la nuboj ekflugante
Krias bird' — kaj nuboj aŭdas
Ĝojon en kuraĝa krio.

En ĉi tiu krio estas
La soifo de l' ventego.

Kolerforton, pasiflamon
Kaj certecon de la venko
Aŭdas nuboj en la krio.

Mevoj ĝemas pro ventego,
Ĝemas, flugas super maro,
Pretaj kaŝi sur marfundo
La teruron pro ventego.

Ankaŭ ĝemas la kolimboj —
Ja neatingebla estas
Al kolimboj la plezuro...
Je l' batalo de la vivo :
Fulmotondroj tro timigas.

Malsaĝul' pingven' timeme
Kaŝas korpon en ŝtonegoj.

Nur fiera Ventegbirdo,
Kun kuraĝo kaj libere
Li flugas super maro,
Maro griza pro la ŝaumo.

Nuboj ĉiam pli mallume
Nuboj ĉiam pli malsupre
Malleviĝas super maro ;
Ondoj saltas al altaĵo
Kaj renkonte al la tondro.

Tondro tondras. En la ŝaumo
De l' kolero ĝemas ondoj,
Disputante kun la vento.
Jen la vento ĉirkaŭprenas
Forte arojn de la ondoj ;
Ondojn ĵetas ĝi eksvinge
Kun sovaĝa kolerego
Sur ŝtonegojn, disbatante
Ilin je la polv' kaj ŝprucoj,
Ŝprucoj kaj la polv' smeraldaj.

Ventegbirdo krie flugas
Je la nigra fulm' simila,
Kiel sag' trapikas nubojn.
Ŝaŭmon per flugil' deŝiras.

Jen portiĝas li, fiera,
De l' venteg' demono nigra,
Kaj ridegas kaj ploregas :
Li ridegas je la nuboj,
Li ploregas pro la ĝojo.

La demono akrasenta	Elkurbiĝas kaj volviĝas
En kolero de la tondro	En la mar', malaperante,
Lacon aŭdas, kaj li estas	Reflektaĵoj de la fulmoj.
Certigita, ke ne kaŝos	
Nuboj sunon — ne, ne kaŝos.	— « Baldaŭ la venteg' bruegos! »
Vento bruas. Tondro tondras.	Tio estas Ventegbirdo;
	La kuraĝa kaj fiera,
Kiĉi blua flam', nubaroj	Liflugadas inter fulmoj
Flamas super marprofundo.	Super maro krieganta
Maro kaptas fulmosagojn	Je l' kolero; tion krias
Kaj en akvoturn' estingas.	La profeto de la venko :
Kvazaŭ la serpentoj fajraj,	— « La venteg', pli forte tondru! »

II. — La Falko.

En montojn alte	Faladis maron	La bird' kaj muĝis :
Kolubr' enrampis,	Kolerĝemante.	« Ĉu vi ekmortos? »
Kuŝiĝis tie	Subite falis	« Jes, mi ekmortos! »
En intermonto,	En intermonton	Respondis Falko,
Kunvolviĝinte	De l' nubo Falko,	Kun spir' profunda :
Ligotubere,	Kun Brust' rompita,	« Mi bone vivis...
Kaj ĝi de tie	Sur plumoj sango.	Feliĉon konas...
Rigardis maron.	Kun kri' mallonga	Mi bataladis....
Sur la ĉielo	Li falis teren	Ĉielon vidis....
Sun' brilis alte,	Kaj batigadis	Vi ĝin ne vidas
Varmege montoj	Per sia brusto	Proksime tiel....
Ĉielon spiris.	Je l' ŝton' malmola	Ho vi, mizera! »
Batiĝis ondoj	Senfortkolere....	« Nu, la ĉielo,
Je l' ŝtonoj sube.	Kolubr' ektimis,	Ĝi estas kio?
En intermonto	Rapide flanken	Malplena loko....
Mallume, ŝpruce	Ĝi ekforrampis,	Mi kiel povas
Renkonte maron	Sed tuj komprenis,	Rampadi tie?
River' rapidis,	Ke viv' de birdo —	Ĉi tie estas
Je l' ŝtonoj tondris.	Du-tri minutojn....	Por mi bonege....
En blanka ŝaŭmo,	Alrampis tiam	Malseke, varme! »
Ĝi, griza, forta,	Ĝi pli proksime	Kolubr' respondis
Tranĉadis monton,	Al disbatita	Al bird' libera

Kaj ekridetis	Kaj ĝi proponis	Kolubr' kuŝante
En la animo	Al bird' libera :	En intermonto
Je l' frenezaĵoj,	« Vi almoviĝu	Longtempe pensis
Kaj tiel pensis :	Al sama rando	Pri birda morto,
« Ja, rampu, flugu,	De l' intermonto	Pri la pasio
Konata fino....	Kaj vi vin ĵetu	Al la ĉielo.
En teron ĉiuj	Malsupren. Eble	Ĝi ekrigardis
Kuŝiĝos, ĉio	Flugiloj viaj	En malproksimon,
Ja cindro estos. »	Vin levos, tiam	En tiun, kiu
	Vi vivos kelke	Okulojn niajn
	En la aero! »	Karesas ĉiam
Kuraĝa birdo,	Ektremis Falko	Per la revado
Ektremis Falko,	Kaj, ekkriinte	Pri la feliĉo.
Leviĝis kelke	Fiere, iris	« Li kion vidis,
Kaj ekrigardis	Al la krutaĵo,	Mortinta Falko.
La intermonton :	Per ungoj glitis	En la dezerto
Tra griza ŝtono	Sur mukaj ŝtonoj.	Sen fund', sen rando!
Elgutis akvo,	Kaj li alvenis,	Pro kio tiaj,
Sufoke estis	Kaj li ordigis	Eĉ jam mortintaj,
En intermonto,	Flugilojn siajn,	Animon nian
Mallume, tie	Kaj li ekspiris	Konfuzas ĉiam
Putraj' odoris....	Per tuta brusto,	Per sia amo
Ekkriis Falko	Kaj li fulmĵetis	Je la flugadoj
Kun malgajeco,	Per la okuloj,	Al la ĉielo?
Kun la doloro :	Kaj — suben falis.	Do kio estas
« Ho se mi povus	Li kiel ŝtono	Por ili luma
Eĉ unu fojon	Rapide falis,	En la ĉielo?
Leviĝi supren	Flugilojn romp	Kaj mi ja povus
Al la ĉielo!	Kaj plumojn perdis....	Ekkoni ĉion,
Mi malamikon	Rivera ondo	Se mi ekflugus
Al Brust' vundita	Per ŝaŭm' vestita	Al la ĉielo,
Alpremus forte....	Lin tuj ekkaptis	Nelonge kvankam. »
Li sufokiĝus	Kaj maron portis,	Ĝi diris, faris.
En mia sango...	Lavinte sangon.	Kunvolviĝinte
Batalfeliĉo! »	Kaj la marondoj	Ringmaniere
Kolubr' do pensis :	Kun ĝem' malĝoja	Ĝi tuj eksaltis
« Ĉu efektive	Je l' ŝton' batiĝis....	En la aeron,
En la ĉielo	Kaj birda korpo	Mallarĝa kiel
Agrabla estas	En mara spaco	Ruband' ekbrilis
Vivad', se Falko	Jam ne vidiĝis....	Ĝi sub la suno.
Ĝemadas tiel! »		

Por ramp' naskita	Sed min ne trompos	Al frenezeco
Ne povas flugi!...	Nun plu iliaj	De kuraĝuloj
Kaj forgesinte	Paroladaĵoj!	Ni gloron kantas!
Pri tio, falis	Mi ĉion scias,	La frenezeco
Ĝi sur la ŝtonojn....	Ĉielon vidis!...	De kuraĝuloj —
Ne disbatiĝis,	En ĝin ekflugis,	Jen vivsaĝeco!
Sed nur ekridis :	Ĝin elmezuris,	Kuraĝa Falko!
« En kio estas	Ekkonis falon,	En la batalo
La agrablaĵo	Ne disbatiĝis,	Kun malamikoj
De la flugado	Sed nur pli forte	Sangelfluiĝis....
En la ĉielon!	Je mi mem kredas!	Sed estos tempo —
En la falado?	Kaj, kiuj teron	Ekflamas gutoj
Ridindaj birdoj!	Ne povas ami,	De cia sango,
Ne konas teron,	Trompiĝe vivu....	Varmega sango,
Sur ĝi sopiras	Mi konas veron,	Je la fajreroj,
Kaj ĉiam celas	Hiajn vokojn	En la mallumo
Ĉielon alte,	Mi ne ekkredos.	De nia vivo
Kaj ĉiam serĉas	Terkreitaĵo,	Kaj ekbruligos
En la varmega	Sur ter' mi vivas. »	Multegajn korojn
Dezerto vivon.	Ĝi kunvolviĝis	De kuraĝuloj
Do tie estas	Sur ŝtono bule,	Je la freneza
Nur malplenaĵo,	Je si fiera....	Soif' de l' lumo,
Kaj mult' da lumo,		De libereco....
Sed estas tie	Briladis maro	Ci, vere, mortis,
Nek la manĝaĵo,	En hela lumo,	Sed en la kanto
Nek la apogo	Minace ondoj	De kuraĝuloj,
Al viva korpo.	Je l' bord' batiĝis.	Spirite fortaj,
Por kio plendoj	En ĝem' leona	Ci ĉiam estos
Kaj fiereco?	De la ondaro	Ekzemplo viva,
Por tiel kovri	Tondradis kanto	Alvok' fiera
La frenezecon	Pri bird' fiera;	Al libereco,
De la deziroj	Ŝtonegoj tremis	Alvok' al lumo!
Kaj kaŝi tiel	Pro la ekbatoj,	Al frenezeco
La netaŭgecon	Ĉielo tremis	De kuraĝuloj
Por vivafero?	Pro kant' minaca :	Ni kanton kantas!
Ridindaj birdoj!		

El rusa lingvo tradukis

N. KABANOV.

LA FREMDA JUNULINO

DE

SCHILLER

En valo, ĉe simplaj, modestaj paŝtistoj,
Aperis komence de ĉiu printempo,
Tuj kiam alaŭdoj pepante flirtadis,
Mirinda fraŭlino majesta kaj ĉarma.

Ĉar ne en la valo ŝi estis naskita,
Neniu ja sciis, el kie ŝi venis,
Kaj ŝia postsigno rapide perdiĝis,
Tuj kiam foriris l' enigma knabino.

Apud ŝi la homoj sin sentis feliĉaj,
Kaj ĉiuj la koroj fariĝis facilaj;
Sed ia indeco kaj io majesta
Familiarecon senĝenan forigis.

Ŝi multon alportis da floroj kaj fruktoj
Mature kreskintaj sur varma kamparo,
En landoj aliaj, pli belaj, pli sudaj,
De kiuj naturon favoras la suno.

Ŝi tiam disdonis al ĉiuj donacojn,
Al unu jen fruktojn, al tiu jen florojn,
Kaj knabo plej juna kaj viro kaduka,
Nun ĉiuj al domo reiris kontentaj.

Bonvenon ricevis la ĉiuj venintoj,
Sed se proksimiĝis jen du geamantoj,
Al ili ŝi donis la fruktojn plej bonajn,
Al paro amanta la florojn plej belajn.

El germana lingvo tradukis.

H. BOUCON.

SONĜO

Aperis en la nokt' trankvila
Virino blankvestita,
Kun kapo de girlando brila
El olivuj' kronita.

Vizaĝo ŝia radiadis,
Simila al suneto,
Kaj en ĉielon rigardadis
Kun dolĉa ĝojrideto.

Kolombo apud ŝi flirtadis
En pura atmosfero;
Leono kun ŝafid' ludadis
Sur la floranta tero.

Armiloj, glavoj disrompitaj
Piedojn ŝiajn tuŝis,
Kaj pafilegoj pecigitaj
Sub la lilioj kuŝis.

Mi suprensaltis, ekkriante :
« Ho! kial vi alvenas? »
Kaj tiam ŝajnis, ke, levante
La manon, ŝi min benas,

Dirante : « Leĝ' de mortigado
Tro longe ĉiun koron
Subpremis; nur la militado
Kondukis en la gloron.

« Nacioj diris : « Neŝanĝebla
« Fatala tiu sorto!
« La paco estas nur trovebla
« Per nenatura morto. »

[pentas
« Sed nun la mond', malfrue,
Kaj ploras pro l' eraro;
La koroj suferantaj sentas
Amdevon al frataro.

« Do jen! komencas novmiljaro!
Mi portas la donacon,
Daŭrontan ĉiam por homaro,
L' universalan pacon. »

« Benata estu vi, — mi kriis, —
Ho! paco bonveninta! »
— Ŝi malaperis — Ve! mi sciis :
Nur estis mi sonĝinta.

CLARENCE BICKNELL.

ESPERANTUJO

(Santa Lucia.)

I

Regno konata
Al progresuloj!
Tero benata
De l' pacemuloj!
Kie troviĝas
La lando bela?
Ĉu vi kaŝiĝas
Hejmo ĉiela?
Ĝi estas ĉie,
Kvankam nenie,
Nia patrujo,
Esperantujo.

II

Ĉe ni aŭdiĝas
Nur harmonio,
Kaj ne vidiĝas
Morta envio.
Ĉe l' idealoj
La niaj belaj,
Vin, ha! bataloj,
Sangaj, kruelaj,
Vin ni ne celas,
Vin ni forpelas
El la patrujo
Esperantujo.

III

Dolĉaj virinoj,
Ho vi, graciaj!
Ĉarmaj reĝinoj,
Vi estas niaj.
Ke do forestu
La vana timo!
Kuraĝa restu
Nia animo!
Ĉar plu kun vi jam
Mortos neniam
Nia patrujo,
Esperantujo.

IV

Kara genio,
Pia, senlaca!
Vin benu Dio,
L' anĝelo paca!
Granda pensulo,
Ni vin honoras!
Bona revulo,
Ni nun vin gloras!
Dion ni preĝu :
Zamenhof reĝu
Longe patrujon,
Esperantujon.

H. BOUCON

MORTO KAJ VIVO

Unuakta dramo.

De sia naskiĝo la homoj balanciĝas inter vivo kaj morto. Unuj subfalas, antaŭ ol ili vivis, aliaj tial ke ili vivis. Morto kaj vivo batalas inter si por altiri kaj ekposedi siajn kaptajojn. Ili sendas al la homoj sciigantojn ofte en formo de individuoj kun deloganta kaj kortuŝanta parolo. En fino morto havas ĉiam superecon. Sed vivo tuj kaj senĉese renaskiĝas en aliaj kreaĵoj, en aliaj homoj antaŭgardataj de morto jam de sia apero. Vivo neniam ploras kaptajojn, kiujn morto forprenas de ĝi, kaj envolvas per siaj zorgoj kaj penoj la nekonatajn novenaskitojn. Nur vivo daŭru en tia aŭ ĉi tia formo, cetero estas indiferenta.

PERSONOJ :

VIRINO.

PALA VIRO.

POETO.

SCENO I.

Salono. Maldekstre kameno kun mortanta fajro. Ĉe ĝia flanko pordo drapirita per malhelaj, longafaldaj, pezaj kurtenoj simetrie levetitaj ĉiuflanke de la pordo. En la fundo granda larĝa fenestro fermita per lignokurtenoj. Dekstre alia pordo sen kurtenoj. VIRINO kaj PALA VIRO ĉe la kameno en apogseĝoj. Ŝi havas grandan storbukedon sur la genuoj.

PALA VIRO. — Morgaŭ je ĉi tiu horo mi ne estos plu en tiu ĉambro. Vi staros sola ĉe la fajro. Vi estos malĝoja... eble?

VIRINO. — Mi pensos pri vi, pri niaj interparoladoj; tio min konsolos en mia soleco.

PALA VIRO. — Jes, vi rapide konsoliĝos.... Ĉu vi sentos almenaŭ mian foreston? (*Ŝi etendas al li manon, li ĝin gardas en la siaj; ambaŭ rigardas la fajron silentante.*)

VIRINO. — La fajro estingiĝas, mortas iom post iom.... (*Ŝi eltiras sian manon el la liaj por preni prenilon kaj almeti lignon. Li retenas sian manon.*)

PALA VIRO. — Ho, lasu morti tiun fajron. Estas tiel poeeca tiu funebra malĝojo, kiu supervagas ĉion, kiu penetregas la aeron. Konturoj de la objektoj apenaŭ lumigataj de agonianta flamo larĝiĝas,

perdiĝas, ankaŭ ŝajnas morti. En duonombro de l' salono ekdorminta kaj muta, mi distingas apenaŭ viajn trajtojn. Vi similas al poezia, diafana, momenta ombro, ne tuŝanta teron, ekflugonta.... Ho, se tio estus vera... ebla.... (*Rigardante ĉirkaŭen.*) Kiajn malviglajn kaj neklarajn ombrojn ĵetas ĉiuj objektoj de tiu salono.... Misteraj estas tiuj horoj! Ĉu via animo ne estas altirata de novaj sentadoj?

VIRINO. — Miajn okulojn altiras la fajro. Mi vidas ĉarmajn ŝajnajojn, mi travidas miajn revojn en ĝi.

PALA VIRO. — Sed turnu do la kapon, vidu! (*Ŝi rigardas.*) Ĉu vi rimarkas tiujn ombrojn? Ĉu vi observis ilin alifoje? Ne? Ĉu ne vere? Estas baldaŭna disiĝo, kiu konfuzas atmosferon.... Se vi volus veni kun mi, ĉio malstreĉiĝus.... La ombroj havus tiam alian sencanon.... (*Silento.*) Vi ne volas min kompreni! Mi foriras tien.... for....

VIRINO. — Tien for?... Sed kien? Kien vi iras? Mi fariĝas maltrankvila. Kia estas tiu mistero?

PALA VIRO. — Ne lasu min foriri sola! Sen vi mi devos nepre halti vojmeze! Sed nenio vin kortuŝas.... Mi scias, vi min ne bedaŭras, vi ne estas malĝoja; vi estas trankvila kaj tio turmentas min.

VIRINO. — Ĉu vi volus do vidi min malfeliĉa? Ĉu tio vin farus kontenta?

PALA VIRO. — Penu iom kompreni min! Certe ne vian malĝojon, ne vian malfeliĉon mi deziras! Sed mi volus forporti kun mi certecon, ke malgraŭ mia foresto via animo disiĝos de la mia neniam,.... neniam! Vivante saman spiritan vivon ni lernis prepari nin al la fino kun samaj espero, konsideri sammaniere vivon kaj morton. Kiam vi rigardas la flamon, kiam vi ĝin vidas morti, mi volus, ke ĉiufoje vi pensus pri mi dirante al vi: « Mi estas preta sekvi lin ».... Vidu nun ĝian morton....

VIRINO. — Sed en tiu flamo mi ne vidas morton, kontraŭe, tie estas vivo, moviĝo, estas malkvieteco de l' fajro.

PALA VIRO. — Ho ne, estas ĝia agonio, ne ĝia vivo.

VIRINO. — Lasu min vidi vivon tie, kie mi ĝin trovas.

PALA VIRO. — Nur en morto troviĝas feliĉegeco! Vi komencis tion kompreni dum niaj longaj interparoladoj.

VIRINO. — Vi min submetadis, vi havis forton kontraŭbatali ĉiujn miajn deziretojn vivi, batali, sukcesi. Sed nun, kiam vi devas foriri, kiam vi min forlasas, ne dirante eĉ kien vi iras, ne klar-

igante al mi vian malaperon, mi ja devas iom reveni al mi mem. Mi pri nenio vin demandas,... estas mistero kaj mi silentas. Sed mi restas por vivi sola kaj... estas necese ja, ke mi vivu!

PALA VIRO. — Vivu en ideoj, kiujn mi al vi lasas! Pensu pri fino, pri celo de nia ekzisto. Rigardadu bone ĉion okazantan ĉirkaŭe, kiel ĉio aspiras morton, nian solan savon. Ĉiu aĝo soifas sian finiĝon.... Vivo estas nur sufero, doloro kaj mensogo. Vero estas tie, kie finiĝas batalo inter vivo kaj morto.... Vi ne scias, kien mi iras;... mi foriras por ne reveni plu, jes, estas kredeble.... Mi estas malforta, mia korpo estas nefidinda, tera vivo ne havas allogon por mi.... Sed mi ne volas vin lasi en sensaĝa batalo inter viaj spiritaĵoj, kaj viaj deziretoj liveri vian estaĵon al komuna vulgara vivo. Rigardu la florojn, tenatajn de vi, ili estas tranĉitaj, ilia batalo estas finita, ilia akra parfumo vaporigis, poezio de morto forĝutas de iliaj kalikoj,... odoro mistera... linioj falantaj... klinitaj. Ili aspiras unuigi kun tero!...

VIRINO. — Ne, ne! Ili volis vivi! Ili falis suferantaj viktimoj de homa avideco. (*Alproksimigante la florojn al la vizaĝo, kaj karesante ilin.*) Malfeliĉaj turmentitaj floroj, se mi povus enblovi vivon en vin! Morti estas terure!

PALA VIRO. — Morti estas dolĉe! Pasi en novan ekziston, kiun ni rekomencos puraj kaj senkulpaj. Ha, dolĉa mistero atendanta nin! Ĉi tiuj pensoj supervagas ĉirkaŭe kaj nin alvokas (*Sin levante.*) Fajro estingiĝas, ombroj ĉiuflanke estas nun pli kaj pli tragediaj kaj ekkuŝas teren en sia tuta longeco kvazaŭ kadavroj. Mallumo iras penetregante ĉion. Ho, se ili kunigus kun si niajn flirtantajn sortojn. (*Enbrakigante ŝin.*) Se ni povus malaperi kun la lastaj brileroj de tiu malĝoja lumo!

VIRINO, *liberigante sin.* — Ho, mi timas, mi timas!... Kiel vi estas pala! Vi ankaŭ havas ŝajnon de ombro!

PALA VIRO. — Ne timu ombrojn! Ili estas tiel facilaj, dolĉaj, travidigaj! Ili estas kiel nedifinitaj flugiloj, misteraj, grizaj... larĝaj flugiloj envolvantaj ĉion forirantan,... flugiloj de morto....

VIRINO, *ektremanante.* — Ho! Mi ne volas!

PALA VIRO. — Ne tremu! Estas necese kutimiĝi al tiu ideo. Ideo de morto estas ideo supera, ĝi devas esti dolĉa al ni! (*Mistere.*) Unufoje en mia vivo mi sentis min envolvata de tiuj grizaj flugiloj de morto, mi kredis esti forportata,... feliĉega sentado! Mi fordonis min sen kontraŭstaro. Sed malgraŭ mia malforteco, estis tro da vivemo en mi,... mi remalfermis la okulojn.... La ensorĉeco mal-

aperis,... sed, kredu al mi, de tiu momento mia animo estas nur duone en vivo! Kiu sentis unufoje enbrakigon de grizajflugiloj, ilian malvarman fremeton ĉirkaŭ sia estaĵo, ilian rigidigantan luladon, iliajn karesojn forportantajn animon, tiu ne povas plu reveni plene al vivo.

VIRINO. — Tamen vi vivas, pensas, sentas kiel ni ĉiuj! (*Rigardante lin kun teruro.*) Vi ne estas fantomo? Ho, kiel pala vi estas! Por kio fari sian vivon tiel malĝoja?

PALA VIRO. — Malĝoja? Ho, ne malĝoja kaptas mian animon. Sed mi troviĝas en aliaj pensoj, en malsama sfero. Miaj sentoj estas ekster la tera rondo, tamen ne malĝoja ĝi estas, sed kvieto, paco, forflugo al revoj de transmorteco, estas duonvivo ĉi tie.... Ho, mi amas tiujn duonsentojn, duonsentadojn, kiam koro forflugas de ĉiu realeco, kiam, en momento fali en ungojn de delogo, oni estas eklevata kaj forportata de nekonata forto! Forportata aliloken.... Kien?... Ĉu mi scias!... Ĉu por longa tempo?... eble!... Kaj poste mi revenas renovigita,... mi reprenas ĉi tiun vivon, sed miaj teraj deziroj revenas plu neniam! Mi estas kvieti, kvazaŭ forstanto...., kiu, jam sin trovinte ĉe alia flanko de sia tombo, ne timas plu morton.... Vi estas sola kreaĵo, kiun mi volus forporti en miajn revojn! Kian feliĉon vi spertus lasante vian animon forflugi en senliman eteron!... Sed vi insistas por vivi! (*Ŝi almetas ankoraŭ lignon en la kamenon.*) Jes, vi almetas ĉiam fajron,... vi ŝatas resti ĉe granda flamo, vi ŝatas malaperigi malhelan ensorĉon, kiun mi altiras, vi forpelas la envolvantajn ombrojn de miaj revoj!

VIRINO. — Sed estas nature, ke mi volas vidi klare! Viaj revoj estas malhelaj por mi, viaj ombroj min tremigas. Mi ne estas altirata de la nekonateco de viaj deziroj. Mi havas miajn dezirojn de konateco, kiujn mi ankoraŭ ne konas, kiujn mi ne spertis, ne travivis. (*Kun interna batalo kun si.*) Jes, mi almetas fajron, mi volas vidi klare, mi volas havi varmon!

PALA VIRO. — Kaj ĉarmo de mortanta fajro? Ho, komprenu ĝin!... Senti mortadon de ĉio ĉirkaŭ si, tio ja estas senti ĉion pasi al eterna vivo! Tio estas vidi ĉion unuigi kun grandeco de la naturo, en kiu ĉio foriras, mortas por naŝkiĝi sub aliaj formoj, en aliaj ideoj!... Mortanta fajro!... Vidi tiun vivon viglan, ŝanĝeman, petoleman, freneze malkvietan, kun helegaj koloroj, kiu elmetiĝas ĉiuloke, kiu volas ĉion enpenetri,... vidi ĝin paciĝi humile iom post iom kaj pasi tra plena gamo de tonoj trankviliĝantaj, malheliĝantaj ĝis la nenio,... ĝis Nirvana.... Tiam ombroj aperas el ĉie kvazaŭ ĥoroj

de antikvaj tragedioj por ĉeesti tiun morton, tiun holokaŭston.

VIRINO, *kovrante sian vizaĝon kun teruro*. — Kaj kio poste?... Kio plu?... Diru rapide! Mi sentas mian animon kaptita (*Ŝi rektiĝas, poste refalas sur apogseĝon kvaŝaŭ nuligita. Oni aŭdas sonoron el preĝejo*).

PALA VIRO. — La sonoriloj de preĝejo ŝajnas tiam funebra vokado. Ĉiu preĝo — primorta parolado.... Nememvole en tiuj momentoj ni alliras al ni ŝajnojn de morto, ni ilin grupigas, ni penetriĝas de graveco, de funebraj sentadoj.... Ĉio fariĝas alia, malegala por niaj intelektaj okuloj.... Kanto estas alvoko for de tie, ekflugo de birdo..., ekflugo de morto.... Meblo similas tombon,... kurteno — mortintokovrilon.... Ĉiu sono nin igas antaŭsentli, kliniĝi..., ĉio iĝas fantomo, aperaĵo. Oni sterniĝas antaŭ nevidebla forto, kiu nin alliras, oni fordoniĝas kaj foriras balanciĝante en grizaj nuboj, oni foriras... al morto....

VIRINO, *lasante sin nememvole forlogi kaj premiĝante al li*. — Poste?... poste?...

PALA VIRO, *envolvante ŝin*. — Poste?... Mi vidas plu nenion.... Miaj okuloj ne povas trabori la grizan nebulon, kiu ĉirkaŭas min, mia forto sola estas tro senvalora. Mi bezonas helpon, kompaton, plifortigon. Mi bezonas animon alplenigantan min, plektiĝantan kun mi en deziro penetri tiun mallumon.... Animon superan, konfideman, sed profundan en ĝiaj deziroj, ne limiĝantan je teraĵoj.... Ho vi, vi! Se vi estus tiu animo! (*Premante ŝin al si*). Vi ne kontraŭstaras plu?!.. Jen la momento! (*La sceno pleniĝas je griza nebulo; ŝanceliĝantaj ombroj ŝvingiĝas malrapide kaj ĝin pleniĝas*.) La fajro mortas; ombroj estas grandaj, la ĉambro pleniĝas je grizaj, konfuzaj aperaĵoj, la aero ekŝanceliĝas ĉirkaŭ ni, nuboj atendas por forporti nin, grizaj flugiloj nin ĉirkaŭprenas per sia mistero.... La floroj sur viaj genuoj tute velkis, parfumo de mortinta korpo eliĝas el ili.... (*Kun ĝojo*.) Ĝi estas ĉi tie, proksime, la morto dezirata, kiu malfermas por ni la pordon de senfino. Fordonu vin tutplene al la deziro forlasi ĉi tiun vivon.... Ni naĝos en oceano de eterneco. Ni mortu, ni mortu kune! (*Li kisas ŝin, ŝi elkrias, liberigas sin de lia envolvo, leviĝas kaj sin apogas, tute perdiĝinte, al la kameno. La floroj falas teren*.)

VIRINO. — Ĝi estas kiso de morto. Ĝia premsigno ĉiam min persekutos!... Ho kompaton! Lasu min vivi! Ĉu oni devas morti, dum oni havas ekflugemon en la animo? Morti, ne disŝutinte riĉecon de sia spirito?! Morti, kiam la koro batas pro antaŭsento de

altega feliĉo! Ho, se vi min alvokas al morto, devas nepre ekzisti iu kompatonta min, alvokonta al vivo!... Vivi, suferi, sin oferi... sed vivi! Jen, kion mi volas. Tra ŝanceliĝado de flamo, kie vi volis, ke mi vidu morton, mi travidis ĵus adorindan aperaĵon. Tiu aperaĵo rompis ĉarmon de jugo de vi surmetita al mi. Ĉe penso resti sola, sen vi, senpeziga, viviga tremo skuas mian tutan estaĵon, kaptas miajn pensojn kaj helpas al mi forĵeti ligojn, kiuj min vindis per ideoj de morto... Ho, ne ankoraŭ, ne ankoraŭ! Antaŭe vivi! Morti por tiu, kiu al mi donos vivon, sed ne por tiu, kiu al mi venenis mian ekziston per funebraj kaj teruraj timoj. Iru! Serĉu morton! Mi trovos vivon!

PALA VIRO, *ne kuraĝante atenci ŝian energion de vivo, malrapide postenpaŝas rigardante ŝin.* — Jes, mi foriras! Mi ne povas plu resti. Mi tro altiris ĉirkaŭ mi aron da fantomoj, esperante ankaŭ vin fortreni kaj forporti kun mi... Mi ne povas plu resti,... mi devas foriri!... (*Lia voĉo iĝas pli kaj pli malforta.*) Sed, kontraŭvole mi penos reveni al vi... Venu tiam al mia alvoko, kiam vi konos vivon kaj komprenos ĝiajn trompemajn allogojn... Mi volus vian feliĉecon for de tie ĉi,... tute plenan!...

VIRINO. — Nenion petu! Ho, lasu min! Mi ne povas nun pensi pri tio. Mia animo ricevis frapiĝon al la vivo. Iru for! Malproksimiĝu! Blovo de morto ne venenu miajn naskiĝantajn fortojn! Iru! Mi volas vivi, vivi! (*Ŝi levas la mortintajn florojn kaj ĵetas ilin en la malfortan flamon.*) Malaperu ĉio mortinta! (*La flamo estingiĝas; unu momenton ĉio estas malhela.*) Lumo! Vivon! (*Ŝi kuras al la fenestro, malfermas plene la lignokurtenojn, kiuj frapas kun krako, la sceno pleniĝas je lumo. Li, tute pala kiel spektro, tremante pro tiu krako kaj ŝirmante sin per manoj kontraŭ lumo, forlasas malrapide, dorsire, la scenon tra la pordo kun kurtenoj; la kurtenoj falas post li kun scingobruo de flugiloj. Tra la malfermita fenestro oni vidas pasi figuron de poeto, havanta en mano rulaĵon maldikan, sed longan, kiun li tenas kiel sceptron.*)

VIRINO, *ĉe la fenestro.* — Tio estas li! Estas li! Mi ja travidis lin en miaj revoj kaj ĵus en ŝanceliĝanta flamo. Kion portas li nun en mano? Ĉu blankajn liliojn, tiujn florojn de poezio? Kien li iras? Kial li min ne vidas. (*La poeto pasas.*) Li malaperas! Poeto! Poeto! Li ne aŭdas!... Ĉu tio estas vivo? Ĉu ĝi komenciĝas kun ploroj kaj suferoj. Ĉu estas vere, ke en ĉiu naskiĝo de vivo troviĝas ĝermo de morto? (*Ŝi etendas la brakojn al la malaperinta figuro kaj apogas la kapon al la fenestro en konsumiĝanta pozo.*) — *Kurteno.*

SCENO II.

Sama salono. La fenestro restas malfermita. Proksime de la kameno ripozas en longa seĝo la Poeto. Li havas bandaĝitan vundon sur la kapo; li dormas. La Virino staras apud li, rigardante lin.

VIRINO, *kun zorgo*. — Li ne revenas al si. De la tempo, kiam oni lin trovis svenintan ĉe mia pordo, kaj mi lin transportigis ĉi tien, li ne diris eĉ unu vorton. Kuracisto, kiun mi alvokis senprokraste, unue lin kredis mortinta, apenaŭ batis ankoraŭ vivo en lia koro. Kio povis okazi al li? Kiu povis lin vundi? Mi vidis lin ĵus viva kaj sana pasi apud mia domo, sed unu horon poste li estis duonemortinta!... Li ne moviĝas!... Ho, se mi povus enigi vivon en tiun senvivan korpon, jes, mian vivon, se estus necese, ĉar sen li... sen li... mi ne volas plu ĉi tiun vivon!... Li aperis al mi en momento, kiam deziro, neceso vivi, min oferi, naskiĝis en mi. Li ricevis ĉiujn ekflugojn de mia vekita estaĵo, kiu antaŭe ne sciis ami. Nun ĉiu fibro de mia estaĵo parolas amon! La kuracisto diris, ke sole flama deziro de vivo povos savi, revivigi lin. Kiel doni al li tiun deziron? Kiel antaŭgardi lin de morto? Mi volas ĵaluze kovri lian kapon, plenan je belaj poetaj pensoj per miaj amemaj brakoj, kiuj etendiĝas al li.... Ho, se ci povus min aŭdi, min kompreni!... Kion mi al ci dirus! Kiel mi cin rigardus!

POETO, *delirante*. — Mi cin aŭdas! Restu ĉi tie ĉiam apud mi! Savu min de morto, kiu min envolvas malgraŭ mi! Ci volas resuprenigi min al lumo?... Faru, faru ĝin!... Redonu al mi vivon, kaj ni forkuru kune!

VIRINO, *feliĉe kaj time samtempe, ekstaras kaj palpas lian kapon*. — Li aŭdas!... Sed tio estas deliro, li raportas al si nenion! Kviete! Vi estas vundita, malsana,... ne moviĝu.

POETO, *ĉiam delirante*. — Jes, se ci tion diras, mi restos, mi obeas! Sed restu tie ankaŭ ci! Ho, kia dolĉa revo post teruro de morto! Ĝi estis ĉi tie, griza kaj malloganta, ĝi penis ĉirkaŭpreni min per siaj malvarmaj kaj nesekaj flugiloj. (*Tremante*.) Ho, mi ĝin vidas ankoraŭ. Mi ne volas! Mi volas vivi, esperi! (*Li refalas konsumita kaj restas inerta*.)

VIRINO, *zorge*. — Li dolorigis al si ekscitiĝante! Li mortefrapigis... eble... (*Genufalante kaj envolvante lin*.) Ho, ne mortu! Revenu al ci mem, mia amo! Ĉu ne ekzistas magneta forto por transdoni al li mian vivemon?

POETO, *ĝemadante*. — Kiu estas tie? Mi soifas. Mia kapo brulas.... Akvon!

VIRINO, *donante al li glason da akvo*. — Trinku kaj revenu al vi! Mi estas ĉi tie por flegi vin.

POETO, *rigardante ŝin kun ekstazo*. — Ho en mia deliro, kiel mi petis, ke vi estu ĉi tie! Vi sola povos savi mian vivon, mi ĝin sentas,... ĉu ĝin sentas ankaŭ vi?

VIRINO. — Kia estus la valoro de amsento, se ĝi nin ne lasus intervidi veron, kiel ajn dolĉa aŭ terura ĝi estas?

POETO. — Do estas amsento, kiu instigas vin gardi kaj flegi min? Kie mi estas? Kiu min savis el profundegaĵo, kien altiris min la malamiko? Ĉu vi konis min?

VIRINO. — Mi vidis vin pasi apud mi, mi rimarkis vin de mia fenestro. Vi portis longajn trunketojn de blanka lilio en mano.

POETO. — Mi portis blankan rulon de miaj poeziaĵoj.

VIRINO. — Ho, estas egale! Ĝi altiĝas al la ĉielo. Al mi ŝajnis, ke dia, dolĉega parfumo de floroj eliĝas el tiu rulo. Vi estis ankaŭ, kiel blanka lilio, rekta kaj suprenstaranta al ĉielo, kaj via kapo estis kvazaŭ kronita de kaliko de lilio....

POETO. — Ĉu mi ŝajnis bela al vi?

VIRINO. — Virino ne demandas, ĉu homo de ŝi elektita estas bela. Ŝi amas lin tian, kia li estas.... Tuj kiam mi vin ekvidis, mi komprenis, ke vi estas poeto, altiĝema animo. Mi alvokis vin, sed vi pasis ne venante al mi, kaj tiam komenciĝis miaj suferoj. Ho, kial vi min ne aŭdis? Nenio estus okazinta al vi, mi estus antaŭgardinta vin de ĉiu malbono.... Kien vi iris? Kio okazis?

POETO. — Kien mi iris? Ĉu mi scias? Miaj revoj volis min alkonduki al vi. Mi serĉis vin! Kiam mi preterpasis vian domon, mi sentis, ke mi ne devas iri antaŭen, ke tie mi trovos mian feliĉecon. Mi returniĝis al vi instinkte, sed en tiu momento el la sama domo, en kiun mi volis eniri, eliris viro pala kaj maldika, pliiĝuste spektro. Li ekstaris antaŭ mi, kiel minacanta morto.... Mi ektimis.... (*Kun teruro*.) Mi provis deklini lin, sed li vundis min grave kaj ĵetis min en malhelan profundaĵon. Mi puŝiĝis al ĉiuj malhelpaĵoj, ŝtonoj min batis, pikaĵoj kaj dornoj eniris en mian korpon, sed vivo batalis kun morto; deziro, neceso atingi vin estis tro vivaj, kaj rampante penegis mi revenis al lumo.... Tie mi kuŝis senforta ĉe la pordo de via domo.... Rulo de miaj poeziaĵoj forflugis el miaj manoj dum tiu batalo. Sed ankaŭ dum tiu batalo mi komprenis tutan prezon de la vivo, kiu de mi forflugis, kaj ĉe la sojlo de

morto, tute vundite, tute sangadante, mi revis freneze pri tiu vivo, pri esperata, sed nekonata feliĉeco.

VIRINO. — Do jen estas la vivo? Revante pri vi, mi volis demandi vin, kio estas vivo. Ĝi do ne estas ploroj kaj suferoj? Ĝi do estas pli bela ol morto? Diru, kio estas vivo?

POETO, *leviĝante kaj vigliĝante*. — Vivon oni ne diras, vivon oni vivas kaj ekkonas vivante! Ĝis nun mi ne vivis, mi revis! Sed kio hieraŭ plenigis mian ekziston ŝajnas al mi ne sufiĉa hodiaŭ. Mi uzis vivon por skribi poetajn verkojn kaj kredis diri veraĵojn, sed nun mi vidas, ke mi diris nenion. Platonika poeto, kiu instruis pri vivo, ne konante ĝin, mortis en mi! Nun mi volas kanti aliajn kantojn! Sed estas necese, ke vi estu ĉi tie por subteni mian fantazion!

VIRINO, *kun timo*. — Ĉu mi tion vere povas? Mi sentas min tiel malforta apud viaj ekceloj!

POETO. — Oni ne devas dubi! Kun feliĉeco alvenas ĉiuj fortoj! Ĉu vi volas tiun feliĉecon? Mi atendas unu vorton, unu vorton, kiun mi antaŭsentas sur viaj lipoj, kiun mi divenas en viaj okuloj! Diru al mi tiun vorton!

VIRINO. — Ho, mi limas! Tiu vorto vin ne faros feliĉa.

POETO. — La vorto, kiun mi volas, estas magia vorto! Se ĝi estas dirita: venas feliĉo, aktiveco, sukcesa laboro, kreita majstroverko. Se ĝi ne estas dirita ĝustatempe: — morto, malhela jugo de fatalo premeĝas. Diru tiun vorton kaj mi reviviĝos!

VIRINO. — Ho, kredu al mi! Kia ajn estas la vorto, kiun vi petas, mi povas purkonscience ĝin elparoli. Ekzistas nenio, kion mia animo ne ekcelas diri al vi!

POETO, *enplektante ŝin per sia brako*. — Vi min amas do forte?

VIRINO. — Mi amas vin per tuta forto de mia estaĵo! (*Subite elŝirante sin de lia ĉirkaŭprenado kaj kovrante sian vizaĝon*.) Sed kiaj timoj, kiaj duboj enpenetras min en momento de tiu konfeso!

POETO. — Ĉu vi dubas ankoraŭ pri mia amo?

VIRINO, *petegante*. — Ni ne parolu pri amo! Mia koro ne havas kutimon al feliĉo. Pikilo de morto traboras ĉiujn miajn esperojn. Mi scias plu nek vivi, nek morti! Nenion diru al mi! Pli bone estas tute vin ne havi, ol vin havi kaj poste vin perdi. Se vi min amas, la sola bono, kiun vi povas fari, estas mortigi min tuj, antaŭ ol konigi ĉiujn suferojn de defalinta amo! (*Falante sur genuojn apud li*.) Ho, morti de cia mano de poeto, kiun mi adoras... Morti de cia volo!..

POETO, *reeksidante sur sian kuŝejon, kaj altirante ŝin*. — Ho, ne!

Ne morto, kiam oni ŝin amas, kiam la koroj batas kaj la lipoj serĉas kisojn! (*Li volas kisi ŝin.*)

VIRINO, *fermante lian buŝon per sia mano.* — Ne kisu! Ne parolu! Feliĉo estas neebla! En momento diri, ke mi cin amas, mi rigardis al la fundo de abismo fosita de nia sentado;... mi travidis ĉion! Amo estas senkompata, ĝi ludas per niaj sortoj por siaj celoj. Mi ŝanceliĝas min doni al tiu alvoko de amo, kiu povas fariĝi ĝia falo, ĝia malfeliĉo. Dum ci al mi nenion promesas,... mi esperas ĉion! Kiam ci al mi diros ĉion,... mi nenion plu povos esperi. Fino de mia amo leviĝos antaŭ mia spirito!... Ho, ne parolu! Nenion diru al mi! Lasu min kredi pri eterneco de amo. Lasu min resti sola benante cian nomon! Ne donu al mi elreviĝojn! Mi suferos sola! Miaj suferoj estos diaj por mi!... Lasu min... aŭ mortigu min tuj!

POETO, *premante ŝin al si pli forte kaj leviĝante kun ŝi.* — Ne, kara frenezulino! Mi cin ne lasos. Ci estas mia! Kaj mi parolos, parolos por pruvi cian eraron. Amo, kiel la nia, estas vera sanktaĵo! Ĝi estas la fenomeno plej miriga, plej belega, kiun la naturo produktas je ni! Ĝi estas ĝia triumfo plej granda, ĝia festo, kiun ni devas festi por ĝia gloro! Nekonataj ankoraŭ hieraŭ, jen ni estas unuigitaj per plej sanktaj ligiloj! Niaj estaĵoj ricevis reciprokan frapiĝon, kaj ĉiu kontakto de niaj rigardoj nin igas tremeti pro feliĉo kaj volupto. Tiuj sanktaj momentoj de vivo estas indaj kaj altegaj! Oni devas trinki ilin, kiel plej ŝatindan nektaron, kaj esti fiera, ke naturo nin elektis por siaj plej belaj karesoj.

VIRINO. — Kia diino oni devas esti por ami viron kiel ci, por esti certa eklevi lin al feliĉo! Ci... ci estas poeto, duondio! Ci travidis horizontojn de paradizo. Ci levis la kurtenon antaŭ eterna lumo! (*Liberigante sin el liaj brakoj.*) Mi... mi estas sole virino!...

POETO. — Jes, virino! Sed virino adorata kiel diino! Ĝuste kun ci mi volas reveni al vivo, kaj al ci mi volas ĝin doni!... Ĉu ci sentas fine, kio estas vivo?

VIRINO, *skuante senkuraĝe la kapon.* — Mi ne scias...

POETO. — Jes, ci scias, ĉar ci amas! De mi ci volas aŭdi, ĉu vivo estas pli bela ol morto! Nu! Aŭskultu do. (*Elŝiras bandaĝon de sia kapo kaj ĵetas ĝin for.*) Vivo estas tiel bela, ke ne ekzistas vortoj por pentri ĝin!... Ĉu oni povas pentri sunon, ĝian blindigantan helecon?... Vivo estas suno, lumo, forto, aktiveco de genio, elŝeliĝanta kreanta talento! Vivo estas radiluma glora forflugo super ĉiuj malfeliĉoj, sur oraj flugiloj de eterna espero!... Ĉu ci volas tiun vivon?

VIRINO, *kiu, dum li parolis, dorsiris malrapide kvazaŭ frapita de la grandeco de liaj vortoj, haltas ŝirmante per la manoj la okulojn kvazaŭ antaŭ suno.* — Mi timas!... Suno blindigas! Kiu kuraĝas rigardi rekte sunon?...

POETO — Ha, ci deiras? Feliĉo timegigas cin?... Ci min forlasas malsanan, malfeliĉan!... Ha, ci min ne amas, ci min ne amas!... Mi devas morti! (*Refalas sur la kuŝejon kovrante la okulojn kaj ploras.*)

VIRINO, *ekcelas al li, falas al liaj genuoj kaj envolvas ilin.* — Ho, ne ploru! Mi estas ĉi tie, mi amas cin! Faru min cia sklavino aŭ cia reĝino, mi estas ĉi tie, por ke ci vivu!... Kiam ci estas malfeliĉa, mi sentas, ke miaj fortoj renaskiĝas. Mi volas, kion volas ci. Ne ploru!

POETO. — Donu al mi cian tutan estaĵon, cian tutan vivon, tiam mi vivos!

VIRINO. — Ha, se ci min tiel bezonas por cia vivo, mi cin forlasos nur, kiam ci estos laca pro miaj karesoj.

POETO. — Ci plenigas al mi la vivon.... Tiu tago ne povas veni!

VIRINO, *prenas lian kapon kaj kisas liajn okulojn kaj vangojn.* — Ploru do plu neniam! Grandaj estas la larmoj de viro; li ne ploras facile kiel virino, sed mi ne volas, ke ci iam havu doloron!... Rigardu!... Mi trinkas ciajn karajn larmojn,... mi estas nun ligita al ci ĝis morto, mi estas venenita de ciaj larmoj, tiu plej dolĉa veneno!...

POETO, *kisas ŝin.* — Ho, mia kara virino!

VIRINO. — Konsoliĝu! Mi cin lulos, cin karesos kiel infanon! Ho, kiel mi cin adoras! Mi, kiu tutan vivon diris: « neniam »! Mi diras nun kun fortreniĝo: « ĉiam, ĉiam »!... Ho, mia reĝo, mia dio! Ci estas sola, kiu povis instrui min vivi.

POETO. — Ho virino! Ho sankta kreaĵo, kiu antaŭe ne kuraĝis rigardi rekte sunon de feliĉo, nun, ne faletante, ci alproksimiĝas al malfeliĉo, ci fordonas cin plene al larmoj kaj doloro. Tia estas cia sortodifino!

VIRINO. — Por cia vivo mi scios ĉiam oferi la mian! Fidu ĝin!... Estu libera kaj granda!...

POETO. — Cia koro sin donas kun beleco! Sed mi cin amas ankaŭ, tial ke ci estas deloganta virino, ke ĉiu trajto, ĉiu vorto, eĉ sono de cia voĉo malfermas mian koron per supera volupto, per pasia korŝanceliĝo.

VIRINO. — Sed mi cin amas, tial ke cia animo estas fortrenata,

altiĝema animo de poeto. Mi cin amas, ĉar ci bezonas min, miajn flegojn, mian vivon!

POETO, *kisante ŝin*. — Ĉu ci ankoraŭ timas la lumon?

VIRINO. — Mi ĝin ne bezonas. Mi ĝin portas en mia brusto kun cia bildo! — *Kurteno*.

SCENO III.

Sama salono. Meze labora tablo, ĉe kiu skribas la Poeto. Sur la kameno kaj mebloj staras vazoj kun bukadoj de blankaj lilioj, kiuj ŝajnas velkintaj kaj nefreŝaj. Sur tablo, kie li laboras, kuŝas lia ĉapelo kaj apude tute freŝa bukado de blankaj datuoj.

POETO, *skribas kaj elparolas laŭte tion, kion li skribas*. — Vivo estas movo, libereco, ĉiam nova ekflugo, senĉese renovigataj impresoj! (*Dum li skribas, la Virino eniras en la ĉambron tra la senkurtena pordo kaj alproksimiĝas malrapide al la tablo aŭskultante lin.*) Vivo ne povas stari samloke, senmove! Ĝi iras, iras ĉiam plu kaj plu kaj kuntrenas en sia fluo ĉion ekzistantan. Ni ne povas limigi nin je tio, kion ni havas; ni devas ĉion serĉi, akiri, nin lasi nove forlogiĝi de ĉiuj riĉaĵoj de ekzisto.... Mi ne povas plu resti ĉi tie, mi devas iri antaŭen.... Ĉu ci volas sekvi min?

VIRINO. — Kien ni irus? Oni estas tiel bone ĉi tie! Ĉi tie ni konis nian feliĉon. (*Metante la manojn sur liajn ŝultrojn.*) Ĉu ci estas laĉa pro ĝi?

POETO. — Ne tio estas! Sed nekonateco estas tiel tenta! Ĝi tenas kuriozecon veke! Ŝanĝo akriĝas la fantazion de poeto, lian kreeman forton.... En vojo oni estas libera, oni ne sentas plu siajn ligojn!...

VIRINO, *kun miro*. — Ĉu ci havas ligojn? Ci,... ligojn?

POETO. — Mi ne scias, kion mi havas, sed mi ne povas plu labori kun fortreniĝo, plu krei ion indan je mi.... Mi estas kvazaŭ malnobligita de tia kvieta vivo, de tia hejma feliĉeco sen nuboj.

VIRINO. — Ĉu ci plendas pri tio?

POETO. — Mi malesperas pri mia talento. Kvazaŭ ne plu por mi estus belaĵoj de universo, — ili estas kovritaj por miaj okuloj de paciga pezo, tra kiu nenia vivo travidiĝas. Ĉio skribita de mi estas sengusta aŭ funebra kaj povas neniam servi literaturon, kaj miaj kreaĵoj ŝajnas al mi kadavroj antaŭ ol esti naskitaj.... Ĉu morto venas?... Ĉu vivo rekomenciĝas? Mia gloro falos! Favoro de la

publiko estas nun por mi kiel almozo ĵetata malestime al almozulo. Ho, kiel mi sentas min malsuprenigita!...

VIRINO. — Ci trompiĝas. Ĉiaj unuaj verkoj skribitaj ĉi tie, en mia domo, estas tiel plenaj je poezio, ke ci mem estis ravita de ili. Penu rememori, kiel la amo igis ĉiajn ekflugojn harmoniaj, kiel ci volis dividi kun la homoj la brilecon de ĉiaj amemaj ideoj! Cia prudento devus bone diri al ci, ke tia amo ne troviĝas ofte!

POETO. — Prudento? Ĉu ĝi estas aŭskultinda? Ne prudento donas al ni plej altajn ĝuadojn; ofte plej nesaĝaj ekflugoj ilin havigas al ni. Nin ĵeti en fajron antaŭigus kelkafoje nian verkon pli ol plej preciza rezonado kaj plej laborema diligenteco! Estu benitaj viro, virino, arta verko, naturbeleco, pasio de nia temperamento kapablaj doni al ni deziron nin ĵeti por ili en fajron!... Sed ĉu tiuj momentoj estas longedaŭraj?...

VIRINO. — Tiuj momentoj ne estas amo! Ho, la viroj ne volas la veran amon! Kiam ili ĝin vidas aperi, ili ĝin rigardadas kiel leviĝon de suno.... Kia pasia scivolo vidi, diveni el kie, el kiu nubo traboros la magia astro.... Koro ŝvelas pro atendo : ... poste... jen fine aperis belega, grandega suno.... Oni estas de ĝi blindigata, oni fermas la okulojn.... Kaj, kiam oni ilin malfermis, la suno jam supreniris pli alten, ĝi perdis sian tutan mirindan rozan koloraron. Ĝia klara kaj varma konstanteco komencas lacigi, tedi.... Oni de ĝi forkuras serĉante kien rifuĝi de ĝia varmo!...

POETO. — Ne rifuĝon mi serĉas, sed vivon liberan, malfermitan al sentoj kaj ideoj!... Estas necese, ke mi foriru! Ĉu ci venas, aŭ preferas resti sola?

VIRINO. — Ci irus tro rapide! Mi ne povus atingi, sekvi cin! Mi timas enaventuriĝi. (*Kun larmoj en voĉo.*) Mia amo estas tro kara por mi! Mi restos por gardi ĝian memoron.

POETO. — Kial larmoj?... La vivon oni devas vivi sen malĝojo. La vivo estas klara kaj simpla.

VIRINO. — Ne, nenio estas simpla en la vivo.... Ĉio estas mistero! Terurego kaptas mian animon, kiam mi pensas pri la tuta mirakla kunĉeniĝo de ĝiaj fenomenoj! Cia forlaso estas la triumfo de la morto.... La morto ĝin volas! Mi ricevis ĝian kison en la momento, kiam ci aperis al mi! (*La scenejo fariĝas iom ruĝa pro sunsubiro.*)

POETO, tremante. — Ho, forpelu tiujn ideojn de morto, forpelu ilin plej malproksimen! (*Levante sin.*) La suno jam subiras, mi devas rapidi.... Ci do ne iras kun mi?... Sed kio okazas al ci? Ci paliĝas?... Ci iĝas malforta?

VIRINO. — Mi ja diris al ci : ... La suno estas tro blindiga por mi. Mi ĝin tro rekte rigardis.... Ĝi blindigis min.... Iru! Lasu min! En cia vaga vojo mi estus ligaĵo por ci.... Mi suferas, sed restas.... Ho, kial ci ne povis ami min... ami min vere!

POETO. — Mi amis cin, sed vivo, gloro, aktiveco min alvokas ĉiam antaŭen, ĉiam antaŭen! Ne suferu! Oni devas ami la vivon pli ol la amon.... Sole la vivo estas konstanta. Vivu per ĉiuj ciaj fortoj, kaj ci forgesos la suferojn.

VIRINO. — Mi ĝin ne povas, mi antaŭsentas morton.... Mia vivo estas plene vivita en mia amo. (*La scenejo fariĝas pli ruĝa.*) Iru! Estas jam malfrue, baldaŭ noktiĝos. (*Ŝi kisas lin.*)

POETO. -- Estu benita pro ciaj bonfaroj! (*Prenas sian ĉapelon.*)

VIRINO. — Ci ne prenas ciajn poeziaĵojn, skribitajn ĉe tiu tablo, antaŭ mi? Ci ne prenas la blankajn liliojn, kiujn mi kulturis por ci?

POETO. — Poeziaĵojn? Mi skribos ankoraŭ multe da poeziaĵoj novaj, diversaj!... Ciajn blankajn liliojn?... Sed ili velkis, ciaj blankaj lilioj.... Rigardu mem bone!

VIRINO. — Jes, mi vidas,... ili velkis.... Ĉio devas finiĝi....

POETO. — Mi mem alportis por ci hodiaŭ freŝajn liliojn. Ili estu cia konsolo sen mi! (*Prenas de la tablo la bukedon de daturoj kaj al ŝi donas.*)

VIRINO. — Tio ne estas lilioj.... Ci eraris! Tio estas venenaj daturoj. Ilia parfumo mortigas kaj inertigas ĉiujn kapablojn. Tio estas floro de infero, sed ne de paradizo, kiel lilio.

POETO. — Donu al mi la daturojn. Mi ilin ĵetos en mia vojo.

VIRINO. — Ho ne! Estu malproksime de ci kaj de cia talento ĉiu veneno! Mi ilin gardas.... Daturoj mortigas precipe je horo de sunsubiro, kiam ilia parfumo estas plej forta! Ne prenu ilin!

POETO. — Ci pensas sole pri mia bono! Cia koro estas granda per fordoniĝemo!... Adiaŭ! Penu esti feliĉa kaj estu benita! (*Li forkuras tra la senkurtena pordo. La suno subiras, la scenejo fariĝas tuj malhela.*)

VIRINO. — Li mem al mi alportis venenon.... Li mem al mi donis liberigilon! (*Rigardante la daturojn kaj ŝtarante ilin.*) Jen estas ĉio restanta de mia amo!... (*Flarante ĉiam la daturojn.*) Mia animo forflugas kun li, kaj mi lasas ĝin forflugi kun delico!... Mia korpo foriris en morton, sed mia animo restas ĉiam apud li... ĉiam... ĉiam.... Morto venas min preni.... Nenio plu min retenas en la vivo.... Mi iras rezignacie kaj obeeme.... Mi konis la vivon,... mi povas sekvi la morton!... (*Tute malfortigita de la veneno, ŝi falas*

sur seĝon. La malhelaj kurtenoj de la pordo dismalfermiĝas kun swingobruo de flugiloj, sur la sojlo aperas la figuro de la PALA VIRO kazaŭ spektro, kaj per tomba voĉo li demandas :)

PALA VIRO. — Ĉu ci havas nun deziron forlasi ĉi tiun vivon?... Ĉu ci volas fine veni al la nenio?

VIRINO. — Mi venas!

(*Ŝi leviĝas kaj ŝanceliĝante, premante ĉiam la daturojn al siaj lipoj, malrapide antaŭenpaŝas al la spektro.*) — *Kurteno.*

NADINA KOLOWRAT.

HIMNO DE SARA¹

DE

PRUS

Kiel granda estas la Sinjoro, kiel granda estas la Sinjoro, Via Dio, ho Izraelo!

Liaj tagoj ne havas komencon kaj lia domo ne havas limojn. Sub lia rigardo la eternaj ĉieloĵoj aliĝas kiel vestoj, kiujn la homo surmetas kaj forĵetas. La steloj ekbrulas kaj estingiĝas, kiel la fajreroj el malmola ligno, kaj la tero estas kiel briko, kiun pasanto unu fojon tuŝis per la piedo, irante ĉiam antaŭen.

Kiel granda estas Via Dio, ho Izraelo. Ne ekzistas tiu, kiu dirus al Li : « Faru ĉi tion! » nek seno, kiu Lin naskis. Li faris la senlimajn profundegaĵojn, super kiuj Li fluas, kien Li volas. Li el la mallumo eligas la lumon kaj el la tera polvo — la kreaĵojn havantajn voĉojn.

Por Li la kruelaj leonoj estas kiel la akridoj, la grandega elefanto estas nenio, kaj la baleno estas apud Li kiel suĉinfano.

1. Tiu himno estas eltirita el « Faraono » (vol. I, ĉap. XVI), bela romano de Prus, kiun nia lerta kunlaboranto Kabe tradukas nuntempe, kaj kiu baldaŭ aperos plena en la « Kolekto de La Revuo ».

Lia trikolora arko dividas la ĉielon en du partojn kaj sin apogas sur la ekstretoj de l' tero. Kie estas pordego, kiu egalas Lian grandecon? Ĉe la tondro de lia veturilo la popoloj falas de teruro, kaj ne ekzistas estaĵo sub la ĉielo, kiu povus kontraŭstari Liajn brilantajn sagojn.

Lia spiro estas la norda vento, kiu refreŝigas la svenintajn arbojn kaj Lia blovo estas la ĥamsino, kiu bruligas la teron.

Kiam Li etendas la manon super la akvoj, la akvo ŝtoniĝas. Li transverŝas la maron en novan lokon, kiel la virino la acidon en la vazon. Li disŝiras la teron, kvazaŭ putrintan tolon, kaj la nudajn suprojn de l' montoj kovras per la arĝenta neĝo.

Li en la tritika grajno kaŝas cent aliajn kaj vekas la birdojn en la ovojn. Li el dormema krizalido eligas la oran papilion, kaj al la homaj korpoj ordonas atendi en la tomboj la reviviĝon....

Li vidas la movojn de la koro de l' raŭpo kaj la kaŝitajn vojetojn, sur kiuj iras la plej izolita homa penso. Sed ne ekzistas tiu, kiu al Li povus rigardi en la koron kaj diveni Liajn intencojn.

Antaŭ la brilo de Liaj vestoj la grandaj spiritoj kovras siajn vizaĝojn. Antaŭ Lia rigardo la dioj de l' potencaj urboj kaj popoloj tordiĝas kaj sekiĝas kiel velkinta folio.

Li estas la forto, Li estas la vivo, Li estas la saĝo, Li Via Sinjoro, Via Dio, ho Izraelo.

El pola lingvo tradukis

KABE.

RESPONDOJ

DE

D^{ro} L. L. ZAMENHOF.

Laŭ la deziro de D^{ro} Zamenhof, ĉiu leganto, iu opinias, ke respondo pri lia demando povus havi kelkan intereson ankaŭ por aliaj personoj, volu sendi sian demandon ne al D^{ro} ZAMENHOF, sed al la Redakcio de « La Revuo ». La Redakcio elektos tiujn demandojn, kiujn ĝi opinios pli interesaj kaj sendos ilin al nia Majstro, kaj tiam li en iu el la venontaj numeroj respondos ilin en « La Revuo ».

16. — Al S^{ro} C. B. — *Pri la prepozicio « da ».* — La esprimo « dum la frua parto *da* la jaro » ŝajnas al mi nebona; mi preferas « *de* la jaro »; ĉar en la dirita frazo la vorto « parto » signifas ne mezuron, sed nur limigitan apartaĵon. Tiel ekzemple « *monato* » estas parto *da* tempo, ĉar ĝi esprimas simple mezuron, sed « *Januaro* » estas parto *de* la jaro, ĉar ĝi esprimas ne mezuron, sed difinitan limigitan apartaĵon; « *Kvaronjaro* » (= mezuro) estas parto *da* jaro, sed « *printempo* » (= speciale montrita parto) estas parto *de* la jaro. Oni devas memori, ke « parto », « peco » k. t. p. havas la senco de mezuro *ofte*, sed ne ĉiam. Dum la vorto « da » (kiu enhavas kaŝite la senco de « ia ») montras, ke ni parolas pri *kvanto* da ia aĵo, sed ne pri ĝia individueco (ekzemple peco da viando = peco da ia viando), la artikolo « la » montras, ke ni parolas pri objekto individue *difinita* (aŭ pri ĉiuj objektoj de la sama speco), de kiu ni prenas parton (ekzemple « peco de la viando, kiun mi havas antaŭ mi »); tial ni povas diri, ke, kvankam *teorie* la kombinado de « da » kun « la » ne estas malpermesata, sed en la *praktiko* tia kombinado estas uzebla nur en tre maloftaj okazoj, tiel malofte, ke ni eĉ povas simple konsili, ke oni *neniam* uzu « da » antaŭ « la » (krom la okazoj, en kiuj la senco tion ĉi nepre kaj tute sendube postulas).

17. — Al S^{roj} J. G. kaj S. H. — *Pri « ĝi » anstataŭ « tio ».* — La vorton « ĝi » ni uzas, kiam ni parolas nek pri viro, nek pri virino, sed pri io, kio ne havas sekson aŭ kies sekso estas por ni nekonata aŭ indiferenta; sekve ni preskaŭ ĉiam povas tute bone uzi tiun ĉi vorton ankaŭ anstataŭ « tio », kies senco estas preskaŭ tia sama. Tial anstataŭ « tio (= la « io » kiun mi nun vidas antaŭ mi) estas vi, Ivan Karpoviĉ », mi povas tute bone diri « ĝi estas vi, Ivan Karpoviĉ ».

18. — Al S^{ro} A. M. — *Pri « ioj », « tioj », « kioj » k. t. p.* — Teorie la ĵus diritaj formoj tute bone povas havi multenombbron tiel same, kiel ili havas akuzativon; sed en la *praktiko* mi ne konsilas al vi uzi la diritajn vortojn en multenombro, ĉar laŭ mia opinio ilia *senco* tion ĉi ne permesas.

« Tio » prezentas ja ne ian difinitan objekton, sed ian *bildon* (aŭ abstraktan ideon), kaj bildo restas ĉiam ununombra sendepende de tio, ĉu ĝi konsistas el unu objekto aŭ el multaj. Tamen se aperas ia tre malofta okazo, kiam la logiko postulas, ke ni uzu la diritajn vortojn en multenombro, tiam la *gramatiko* de nia lingvo tion ĉi ne malpermesas. Ekzemple : « Lia potenco konsistas el diversaj *ioj*, el kiuj ĉiu aparte per si mem estas ne grava, sed ĉiuj kune donas al li grandan forton ».

19 — AL S^{ro} P. C — Pri « ablativo absoluta ». — Ablativo absoluta estas speciala formo, uzata nur en kelkaj tre malmultaj lingvoj ; en Esperanto ĝi *ne* ekzistas. Kvankam ĝi nenie estis rekte malpermesita, tamen ĝia uzado estus kontraŭ la spirito de nia lingvo. En Esperanto la adverba partecipo ĉiam rilatas la subjekton de la ĉefa propozicio. Sekve oni povas diri « farinte (= kiam la *leono* faris) la dividon, la *leono* diris », sed oni ne povas diri « la divido estante farita (= kiam la *divido* estis farita), la *leono* diris ». Enkonduki la latinan aŭ francan ablativon absolutan (kiu por la plimulto da nacioj prezentus ion nenaturan) ni tute ne bezonas, ĉar ni ĉiam povas ĝin anstataŭigi per formo pli natura. En via frazo (« la reĝo kunvokis siajn konsilistojn, por ke, *ĉiu el ili eldirante sian opinion*, li povu fari decidon ») ni povas ja tute bone anstataŭigi la substrekitan esprimon per « kiam ĉiu el ili eldiros sian opinion », aŭ per la pli mallonga « aŭdinte la opiniojn de ĉiuj ».

20. — Al tiu sama. — Pri la infinitivo en kelkaj specialaj okazoj. — Kiel ni diras « mi vidis lin sana », (= « ke li estas sana ») — tiel laŭ mia opinio ni povas ankaŭ diri « mi vidis lin kuri » (= ke li kuras »), « mi aŭdis lin paroli » (= « ke li parolas »); sed la esprimojn « li faris ĉion sen ridi » aŭ « li restis du tagojn sen manĝi » mi *ne* konsilus al vi uzi. Prepozicion antaŭ verbo mi konsilus uzi nur en okazo de *necesece*, se alie ni ne *povas* bone esprimi nian penson. Sed anstataŭ « sen ridi » aŭ « sen manĝi » ni povas ja tre bone diri « sen rido, sen manĝo aŭ « neniom ridante », « nenion manĝante ».

21. — AL S^{ro} H. S. — Pri la vorto « ĉu ». — Vian opinion, ke la vorton « ĉu » ni devas, kiom eble, uzadi nur en senco demanda, mi trovas tute prava. Ni povas ĝin uzi ankaŭ en la senco de necerteco, aŭ de dubo, aŭ en aliaj similaj sencoj, kiam ni ne havas pli bonan vorton (kiel en via ekzemplo « ĉu pro timo, ĉu pro fiereco, li nenion respondis »); sed mi neniam konsilus uzi ĝin tute senbezone anstataŭ « jen », « aŭ », k. t. p. Prave vi diras, ke la frazoj « ŝi kutimas havi ĉe sia zono ĉu rozon, ĉu diamanton » kaj « diru tion ĉu al la kapitano, ĉu al la leŭtenanto » estas ne tre bonaj; en la unua okazo mi preferus « jen », en la dua « aŭ ».

LAZARO LUDOVIKO ZAMENHOF.

Noto de la Redakcio. — Ni kun plezuro konstatas, ke la bonega « *Grammaire complète* » de S^o Aymonier estas en plena konsento kun tiuj respondoj. Oni legu en tiu verko : n^ojn 371, 393 (Resp. 16), n^ojn 171-173 (Resp. 17), n^ojn 169 (Resp. 18), n^ojn 322, 349 (Resp. 19), n^ojn 354-358 (Resp. 20).

BIBLIOGRAFIO

« LA REVUO » raportas pri novaj verkoj, nur kiam la Redakcio donace ricevis du ekzemplerojn.

La kolekto de « La Revuo ». — Niaj legantoj tre certe jam konstatis, ke la Redakcio de « La Revuo » kiel eble klopodas, por ke la artikoloj enpresitaj estu ĉiam bonstilaj, gramatike korektaj kaj kiel eble sen preseraroj. Por respondi al multaj petoj de diversaj flankoj al ni senditaj, ni decidis, ke ni fondos « Kolekton de La Revuo, » kiu konsistos el libroj tiel zorge reviditaj kaj presitaj kiel nia gazeto mem. Tiu kolekto enhavos :

1^e represajojn de en « La Revuo » aperintaj artikoloj;

2^e lernolibrojn severe konformajn je la « Fundamento » de nia Majstro kaj je la konsiloj, kiujn li al ni donas en siaj multvaloraj « Respondoj »;

3^e novajn literaturajn verkojn, kies amplekso estas tro granda, por ke ili povu aperi en la gazeto, kaj verkitaĵn de niaj plej bonaj aŭtoroj.

Jam aperis en tiu kolekto du lernolibroj, pri kiuj ni ĉi-sube raportas; kaj ni povas anonci, ke estas nun en presado grava bela romano de PRŪS titolita *Faraono* kaj tradukita de nia eminenta samideano *Kabe*. Por doni al niaj legantoj jam antaŭan impreson de tiu ĉefverko, kiu estas tre longa, ni publikigas en tiu numero pecon el la unua volumo.

Grammaire complète d'Espéranto, plena detala gramatiko por Francoj verkita de C. AYMONIER, profesoro en la liceo Charlemagne. 4 vol. 166-paĝa; « Kolekto de La Revuo », Hachette et C^{ie}, Paris; prezo: Fr. 1,50. —

Antaŭ ĉio ni devas laŭte diri, ke

tiu nova gramatiko ne estas verkita por komencantoj, sed por tiuj, kiuj, jam konante la principojn de nia lingvo, deziras akiri perfektan stilon esperantan kaj verki presotajn artikolojn.

Kelkaj el niaj samideanoj pretendas, ke *detala* gramatiko de Esperanto estas tute senutila kaj eĉ kelkafoje malutila, ĉar ĝi kredigas, ke la ĉielaŭdata simpleco de Esperanto estas nur fanfarona mensogo.

Tiuj, kiuj tiel parolas, estas plej ofte malnovaj Esperantistoj, kiuj jam de longe lernis Esperanton jam sciante antaŭe pli ol unu lingvon, kaj kiuj nun ne plu povas taksi la influon de la jam konataj lingvoj nek la intensecon de sia senkonscia laboro por bona akiro de severe korekta stilo (supoze, ke ili ĝin posedas).

Tre prave en sia antaŭparolo S^o Aymonier diras : « Esperanto estas simpla, tial ke ĝi estas logika. Sed niaj lingvoj estas nek simplaj nek ĉiam logikaj. Sed parolante ni ne faras logikan analizon; ni ĝin ne faris, kiam ni lernis nian gepatran lingvon. La sperto de instruistoj montris, ke la ĉiuaĝaj lernantoj iom malfacile faras ĝustan logikan analizon. Ekzemple la franca vorto *que* estas vice pronomo, konjunkcio, adverbo kaj oni devas ĝin traduki diversmaniere en ĉiujn lingvojn. Esperanto estas tre facila por tiuj, *kiuj scias la gramatikon*. Por tiuj, kiuj ĝin malbone scias aŭ ĝin forgesis, gramatiko aranĝita laŭ la plano de niaj naciaj gramatikoj estos eble utila. Ĝi ne estos senutila por tiuj, kiuj elkonas ĉiujn gramatikajn

malfacilaĵojn; ĉar ĝi ŝparigos al ili eĉ la pripensan necesan penadon ».

Al tio ni aldonos, ke tiu plena gramatiko tre certe servos al ni por kontraŭbatali la ignorantojn, kiuj, precipe pro ĝia simpleco, pretendas, ke Esperanto estas ia abomena slango malinda je ia atento.

La multegaj demandoj adresitaj al nia Majstro de spertaj Esperantistoj pri gramatikaj punktoj, la multaj eraroj, kiujn oni trovas en preskaŭ ĉiuj manuskriptoj, kaj eĉ en pli ol unu libro aŭ gazeto, nepre pravas, ke detala gramatiko estas tute necesa. Plej rimarkinde S^o Aymonier trafis sian celon, kaj ni ne dubas, ke lia verko longe restos la tipo de l' superaj gramatikoj kaj la orakolo, al kiu oni sin turnos en malfacilaj okazoj. Cetere ĝi estas severe konforma je la Zamenhof'aj reguloj, kaj ĉiuj ekzemploj estas elprenitaj el la verkoj de nia Majstro.

Esperanta Sintakso, de PAUL FRUICIER kun antaŭparolo de Prof^o TH. CART. Nova eldono, 1 vol. 80-paĝa; « *Kolekto de La Revuo* », *Hachette et C^{ie}*, Paris; prezo : Fr. 1, 50. —

Dezirante posedi en sia kolekto bonan internacian gramatikon de Esperanto, la Redakcio de « *La Revuo* » opiniis, ke ĝi nenion pli bonan povos fari, ol simple akiri la jam ĉiekonatan kaj tre ŝatatan Sintakson de nia sperta samideano S^o Paul Fruicier. Laŭ afabla interkonsento inter la *Presa Esperantista Societo* kaj la firmo *Hachette*, tiu bonega verko eniris do nian kolekton. Oni de nun devas sin turni al *Hachette* aŭ al ĝiaj ĉiulandaj korespondantoj por ricevi tiun libron.

Brazila Revuo Esperantista, monata gazeto; sin turni al la *Redakcio de la Brazila Revuo Esperantista*, Rua da Assembléa, 46, Rio de Janeiro; jare : Fr. 6. —

Ĝus aperis la unua numero (aprilo) de tiu nova bonega gazeto, kiu pravas al ni, ke Esperanto nun fortike enradikiĝis en Brazilujo. La redaktoroj estas S^o Alberto Alvares, F. Vieira, Reynaldo F. Geyer, Everaldo Backheuser, jam bone konataj kiel fervoraj propagandistoj. La gazeto estas bele presita kaj la teksto tre bonstila; ni ne dubas, ke ĝi multe helpos la disvastigon de nia lingvo ne nur en Brazilujo, sed ankaŭ en ĉiuj portugallingvaj landoj.

Delmasaj Helpaj Bildoj por la praktika instruado de l' modernaj lingvoj, esperanta traduko de L. DE BEAUFONT. 2 kajeroj (46 bildoj) kun 108-paĝa « klariga » libreto; ĉe *G. Delmas*, Bordeaux; prezo : Fr. 6,25. —

La Delmasa tre konata metodo estas buŝa perbilda instrua maniero. Ĝi jam ekzistis en 7 lingvoj kaj dank' al S^o de Beaufront ni nun posedas ĝian esperantan eldonon.

Ni jam ofte klarigis nian opinion pri la plej bona metodo de instruado de Esperanto, kaj ni jam rediris, ke la *pure* senpera buŝa maniero ne plene taŭgas por nia tiel logika lingvo.

Jen kial tre prave, laŭ nia opinio, la Delmasaj Bildoj estas nomitaj « *helpaj* ». Ili efektive ne povas anstataŭi lernolibron, kaj ellernado de Esperanto per la ekskluziva uzado de tiuj bildoj estus longa kaj mankplena.

Tiuj bildoj estos utilegaj por lernigi al la lernantoj *vortojn*, multajn *vortojn*; sed la necesa unuformeco kaj naiva simpleco de l' priskriboj

kaj rakontoj konigus nur al ili simplajn, tro simplajn, gramatikajn formojn. Niaj ĉiulandaj profesoroj de Esperanto certe ilin uzos kun granda profito kiel helpan rimedon por kutimigi la lernantojn al parolo kaj encerbigi multajn vortojn.

La kvanto da objektoj, kiujn enhavas D. H. B. estas tiel granda, ke ilia aplikado al nova lingvo postulas tiel saman laboron, kiel la kreado de nova vortaro. Kiamaniere plenumis sian taskon S^{ro} L. de Beaufront, plej bone klarigas lia antaŭparolo al la « klariga libreto ».

« Kiel eble plej multe, — diras la aŭtoro, — mi evitis enkonduki novajn radikojn, ĉar mi opinias, ke pri tiu ĉi punkto ni devas esti sobregaj. Sed sur la vojo mi renkontis teknikajn aŭ metiajn ideojn, kiuj postulis ne proksimuman, sed tute ĝustan kaj propran esprimon. »

Jen la listo de tiuj radikoj de la libreto, kiuj ne estas troveblaj en la vortaroj de D^o Zamenhof :

Alpenstoko, adjunkto, basoto, belvedero, bumbono, cutelo, ĉaleta, ĉampanjo, ĉekardo, diligenco, dogano, floti, fortreso, freno, fucilo, gabaro, gasuzino, geridono, ĝiĉeto, graniero, incendio, inundado, kargo, kopso, kroketo, lambrekeno, luko, maleo, mareo, marmito, masivo (*forbedo*), mercero, morelo, noĉo, pakboto, pikoro, pilo (*de ponto*), pinjono, pobo, pranci, progresive, pruo, raŭfo, repetitoro, sarpilo, skvaro, solivo, stako, ŝedo, taluso, traŭbo, vazistaso.

Kelkaj el tiuj novaj radikoj celas anstataŭi aliajn; ekzemple *ĉampanjo* anstataŭ *ĉampano* de la Universala Vortaro, *mareo* anstataŭ *tajdo*, vorto elektita de niaj maristaj samideanoj kaj alprenita de D^o Zamenhof en sia vortaro, k. c.

La Delmas'aj bildoj, en Esperanto, estas granda akiro por nia afero. Ili ne sole povas esti uzataj kiel amuzilo kaj lernigilo por junuloj :

ili povas egalmaniere servi, kiel fonto por diversaj rakontoj kaj priskriboj, ĉar tiu ĉi bildaro enhavas grandan nombron da objektoj aplikitaj al diversaj temoj el ĉiutaga vivo.

La eldono de D. H. B. estas bele kaj tre precize farita. Ni esperas, ke la nomo de ilia esperanta aŭtoro, ilia interesa enhavo kaj praktika valoro sufiĉos entute, por ke ili estu plej rapide disvastigitaj inter niaj samideanoj kaj iliaj ankoraŭ ne esperantigitaj amikoj.

Esperanto. Gramatica completa y elementos del diccionario en verso de Inocentado Esperantista por.... INU (UNO). 4 vol. 7-paĝa; *Valencia, Avellanos 11*; prezo : P. 0,40. —

Antaŭ nelonga tempo ni havis la okazon skribi en tiu ĉi loko pri la sprita verketo de unu el niaj hispanaj samideanoj, kiu provis per la verbo *ami* konatigi siajn kunnaĉiulojn kun Esperanta gramatiko. Nun tiu ĉi gramatiko eliras en Hispanujo en la formo de versoj. Ne mankas la sprito al niaj hispanaj amikoj. Ni deziras sukceson al ambaŭ verkoj !

Kelkaj floroj Esperantaj. Agrablaj legajoj kun multaj ilustraĵoj de A. J. WITTERYCK, *prezidanto de Bruĝa Grupo Esp.*; serio 1^a, N^o 3. 4 vol. 23-paĝa; prezo : Fr. 0,20. —

La 3^a N^o de Floroj Esperantaj estas tiel same eldonita, kiel la antaŭaj. Multenombraj ilustraĵoj, bone elektitaj spritaĵoj kaj humoraĵoj faras el ĝi tre interesan libreton por la legado. Ĝia stilo estas tute bona, kaj tio ĉi estas ĝia granda valoro, ĉar humoraĵojn oni legas volonte, sed tre ofte.... nur ilin.

Grand Dictionnaire Français-Esperanto, kvara kajero. Paĝoj 49-64,

Presa Esperantista Societo, Paris. —

Kun plezuro ni ricevis tiun kvaran kajeron, kiu pruvas la nunan regulcon de la apero de la verko. Ĝi estas zorge ellaborita koncerne la komunajn vortojn, sed kial, enmetante en sian vortaron teknikajn terminojn, la anonimaj aŭtoroj ne petis konsilon de specialistoj aŭ almenaŭ tralegis la nunekzistantajn terminarojn aŭ eĉ la lastan eldonon de la vortaro de D^o Zamenhof? Ekzemple post la franca vorto *angle* oni legas : *sommet* pinto, *côté* flanko ; kaj la vortoj donitaj de S^o Bricard, kaj akceptitaj de nia Majstro en sia vortaro, estas : *vertico* kaj *latero*. Efektive vertico ne estas *pinto*, sed ia difinita speciala *punkto*, kaj *latero* ne estas flanko, sed *parto de rekto*. Plie ni trovas, ke la vorto *edro* signifas ankaŭ *angle* (angulo)! Laŭ Bricard edro signifas *limigita ebena*, kaj tio estas konforma je la etimologio. Cetere *diedro* aŭ *duedro* signifus tiam « kio havas du angulojn », kaj fakte *duedro* estas figuro konsistanta el *du ebena* limigitaj ĉe sia komuna interseko kaj formantaj *unu angulon*. Dodekaedro (dekduedro) estas korpo, kiu estas formita el *dek-du ebena* (edroj), sed kiu havas *dudek* verticojn kaj *tridek* poliedrajn angulojn.

Bedaŭrinde tiu ekzemplo ne estas la sola, kaj ni do povas timi, ke la uzontoj de tiu vortaro tiel enkondukos kelkajn konfuzojn en nian lingvon.

Katalogo muzika kaj teatra estos senpage ricevebla de la *Librairie de l'Esperanto*, 46, rue Sainte-Anne, Paris (2^e). —

Blackpool, the oficial Guide, oficiala eldonaĵo de la urbo *Blackpool*, 1 vol. 62-paĝa multilustrita. —

Tiu libreto estas bela ilustrita priskribo de la ban-marurbo *Blackpool*, kiun certe multaj Esperantistoj vizitos okaze de la Cambridge'a Kongreso. (*Vidu la rozan paĝon 3.*)

Franca Gramatiko por Esperantistoj, de PAUL BOULET, sekretario de la Unua Kongreso de Esperanto, hon. sekretario de la grupoj de Boulogne kaj Rouen. Antaŭparolo de S^o E. BOMAC. 1 vol. II-85 paĝa; *Presejo Jobard*, Dijon ; prezo : Fr. 1,50. —

La tiel longe atendita franca gramatiko por Esperantistoj, fine aperis. — S^o Boulet donis tre gravan pruvon, kiu devos montri al la homaro, ke la lingvo internacia tute ne celas la forigon de lingvoj naciaj. Mi ne kredas tamen, ke tiu ĉi riproĉo povus esti de iu ajn serioze defendata; en ĝi kuŝas, saĝnas al mi, pli grava afero; niaj kontraŭuloj, antaŭŝovante tiun ĉi riproĉon, pensas tamen pri io alia. Bedaŭrinde ĝis nun kelkaj nacioj ne perdis ankoraŭ esperon, ke ilia lingvo iam fariĝos internacia, kaj kaŝante diskrete sian veran penson, ili batalas per tiu ĉi tre mizera kaj senserioza batalilo.

Tial mi ne haltos pli longe, priparolante la gravecon de la verko de Boulet je tiu ĉi vidpunkto. Laŭ mia opinio, « Franca Gramatiko por Esperantistoj » havas alian multe pli gravan valoron — valoron realan. Ĝi montras, ke Esperanto, kiu jam tiom da utileco liveris en diversaj rilatoj internaciaj, estas, kiel ĉiuj aliaj lingvoj, vivoplena kaj la plej bona rimedo por studado de fremdaj lingvoj. Kiu konas lernolibrojn de iu ajn fremda lingvo, tiu plej bone povas atesti, ke preskaŭ ĉiuj ili estas plenaj de mankoj kaj eraroj, kaj tio ĉi estas

tute komprenebla. Se iu Franco, ekzemple, eldonas anglan lernolibron por Francoj, li devas nepre koni ambaŭ lingvojn egale, alie la lernolibro ne estos tute ĝuste verkita. Tamen tre ofte, tio ĉi, bedaŭrinde, ne okazas, kaj ni ĉiuj bone scias, kiamaniere estas verkitaj tiuspecaj lernolibroj. Plej bone estus, se lernolibro de iu ajn lingvo estus verkita per persono apartenanta al tiu ĉi nacio, kaj tio ĉi ankaŭ povas nur okazi, se la lernolibro estas verkita en tiu lingvo, kiun la verkisto posedas tute bone, kiel sian propran lingvon. Mi ne diras, ke tio ĉi estas ne ebla, sed tamen ĝi okazas ne tre ofte, kaj niaj junaj lernantoj nutriĝas ĝenerale per materialo, kiu bedaŭrinde estas tre malproksima de la dezirata idealo.

Ni esperas, ke la sukceso, kiu sendube renkontos la tre utila verko de nia samideano, kuragiĝos lin eldoni pli grandan lernolibron. Ni varmege rekomendas al ĉiuj Esperantistoj la « Francan Gramatikon por Esperantistoj ». De nia subteno dependas unue la apero de la dua eldono en pli granda formo kaj due — la tre dezirindaj paŝoj en tiu ĉi direkto, en ĉiuj aliaj lingvoj.

Vocabulaire français-Esperanto de Photographie, verkita de CH. VÉRAX, 1 vol. 44-paĝa; ĉe *Charles Mendel*, 118, Rue d'Assas, Paris; prezo: Fr. 0,75. —

Nia lerta samideano S^o Ch. Vérax, kiu pro sia longa kunlaborado en la « Internacia Scienca Revuo » akiris specialan kompetentecon pri teknikaj terminoj, verkis mallongan specialan leksikonon de la plej necesaj vortoj por fotografistoj.

Tre certe tiu vortareto tre servos al niaj fotografemaj amikoj kaj

faciligos la ellaboron de artikoloj en « Foto-Revuo ».

Pri la enhavo ni ne parolos, ĉar S^o Ch. Vérax verkis multe pli gravan terminaron, kiun li submetis al multaj ĉiulandaj teknikistoj, kiu estas nun en presado, kaj pri kiuj ni kritikos kaj longe parolos, kiam ĝi aperos.

Pri unu speco de kurbaj linioj de Prof^o A. DOMBROVSKI. 1 vol. 23-paĝa; prezo: Mk. 0.50. —

Pri novaj trigonometriaj sistemoj de Prof^o A. DOMBROVSKI. 1 vol. 35-paĝa; prezo: Mk. 1,50. —

S^o Prof^o E. Peltier el S^o *Radegonde*, apud *Tours* (Indre-et-Loire), Francujo, sciigas al ni, ke tiuj konataj verkoj de nia estimata samideano estas nun aĉeteblaj pogrande kaj pomalgrande ĉe li.

Pri Esperanto Per Esperanto, 5-paĝa ilustrita eltiraĵo el la 1906-kristnaska specialnumero de la komercega gazeto « Affärsvälden » —

Nia sindona kunbatalanto S^o P. Ahlberg sendis al ni tiun tre belan kaj interesan raporton pri la Ĝeneva Kongreso kaj la esperanta afero. Ĝi aperis en tre grava sveda komerca gazeto, kaj certe tre utilis la propagandon inter la sveda komercistaro. Ni ne scias, ĉu la eltiraĵo estas aĉetebla. Oni ĉiokaze povos sin turni al S^o Ahlberg.

Londona gvidlibreto speciale eldonita por la Kongresanoj. 1 vol. 48-paĝa; prezo: Fr. 0,40. —

La Londona Esperantista Klubo sciigas al ni, ke ĝi eldonos specialan gvidlibreton por la Kongresanoj, kiuj trapasos Londonon. Tiu verketo enhavos informojn pri la Londonaj vindindaĵoj, stacidomoj, restoracioj, anglaj moneroj, k. c... Ĝi aperos en la komenciĝo de Junio.

KRONIKO

Letero de La Trio por La Tria al la legantoj de « La Revuo ». — *La Trio* kore dankas tiujn, kiuj afable jam sendis siajn alĝilojn por *La Tria*, laŭ la peto trovebla en « La Revuo », kaj aliloke.

Personoj, kiuj deziras, ke ni trovu por ili ĉambrojn, devas sciigi siajn bezonojn kaj samtempe sendi aŭ la tuton aŭ *almenaŭ unu kvinonon* de la tuta luprezco, kiel garantian pagon.

Ni jam klopodas pri la Kongresa Libro, kaj decidis premeti anoncojn laŭ la sekvanta prezaro: Unu plena paĝo, Fr. 30; 1/2 paĝo, Fr. 16; 1/4 paĝo, Fr. 9.

Esperantistoj, kiuj deziras uzi tiun ĉi rimedon por konigi siajn komercaĵojn al la Kongresanoj estas petataj mendi antaŭ la 15 de Junio.

Personoj, kiuj deziras ekspozicii iajn aferojn, devas tion sciigi al *La Trio* antaŭ Junio 15, kaj, se la propono estos aprobita, la elmontrot-aĵoj mem devas esti senditaj antaŭ la komenciĝo de Julio.

Al personoj, kiuj ne mangas viandon, oni konsilas lui nur siajn loĝejojn kaj fruan matenmanĝon nuntempe, kaj ili ricevos, tuj kiam ili estos pretaj, la proponojn pri la servianda restoracio.

Multaj amikoj demandas, kiom estas la fervoja pago inter Londono kaj Kembriĝo. Ordinare la ir-kaj-reira bileto kostas: Fr. 12 (9 ŝ. 3 d.) sed por tiuj, kiuj havas Kongresan Bileton, la kosto estos nur Fr. 7 (5 ŝ. 10 d.).

Ni havas plezuron sciigi al la ne-Anglaj Esperantistoj, ke la biletoj de Parizo ĝis Londono *via* Calais kaj Boulogne valoros de la 7 ĝis la 30 de Aŭgusto, kaj ne nur por dek-kvar tagoj, laŭ la anonco antaŭe farita.

La Trio dankas tiujn grup-sekre-

tariojn, kiuj afable sciigas, kiom da specialistaj kunvenoj ili deziras havi dum la Kongreso. Espereble ĉiuj baldaŭ estos sendintaj tiun informon.

Ankaŭ, se Prezidantoj aŭ Sekretarioj de lokaj aŭ naciaj grupoj bonvolos sciigi, ĉu iuj el iliaj talentaj membroj ĉeestos, kaj konsentos aŭ ludi, aŭ kanti, ni plezure enskribos la fakton sur niaj libroj.

La dudeka Jubileo de Esperanto.

— La 21 de Julio 1887, la cenzuro, kiu, laŭ la rusa leĝo, permesas aŭ malpermesas la presigon de libroj en Rusujo, permesis, ke la unua libro de D^{ro} Esperanto pri *Lingvo internacia* estu presota. Tiun gravan daton por nia afero ĉiu Esperantisto devus neniam forgesi, kaj por ke ĝi estu pli solene glorita, kelkaj el niaj samideanoj opinias, ke oni devas elekti ĝin, kiel « ĝeneralan festan tagon de la Esperantistaro ».

La ideo estas bonega. Granda tutmonda festo certe altirus al Esperanto la tutmondan atenton; sed krom tio ŝajnas tute taŭge, ke la Esperantistoj, kies nombro pli grandigās ĉiutage, datumu la unuan ĉiujaran feston de la jaro, kiu estas la dudeka datreveno de la oficiala naskiĝo de Esperanto. Ni do esperas, ke la legantoj de « La Revuo » pravigos tiun ideon, kiun aprobas D^{ro} Zamenhof mem. Laŭ tiu opinio, ŝajnas tute necese, ke la ĉiulandaj societoj kaj la lokaj grupoj festu tiun gloran datrevenon de la 21 de Julio per solenaj festoj, kies eĉo trairos la universan mondon.

El Brazilujo. — Esperanto multe progresadas en Brazilujo dank' al S^o Everardo Bakheuser, la fondinto de la Brazila klubo Esperantista.

Oni malfermis kursojn en Rio de

Janeiro ĉe la nacia gimnazio, kun la aprobo de l' ministro de la Internaferoj. En Niteroi, kaj Porto-Alegre, multaj lernantoj aŭskultas la kursojn de S^o Murilo Furtado, kaj Fred Geyer. Fine en Rio de Janeiro S^o Ernani Mendes ĵus fondis novan grupon « la Verda Stelo ».

La nova gazeto Brazila sciigas, ke de la 12 ĝis la 19 de Julio okazos, en Rio de Janeiro, Brazila nacia kongreso de Esperanto por akceli la propagandon kaj konigi la fort-ojn de la kvin jam ekzistantaj Societoj esperantistaj en Brazilujo. Ni tre gratulas niajn sudamerikajn samideanojn pri tiu bona iniciato, sekvinda ekzemplo donita al la landoj, kie la esperantista estraro ne kontaktas kun la fervoraj batalantoj.

Estas ankaŭ anoncita la grava fakto, ke en Brazilujo, dank' al klopodoj de S^o D^o Mededros Albuquerque, Esperanto estas nun oficiale akceptita kiel *klara* lingvo por telegramoj.

El Francujo. — La 16 de Februaro, en Lille, la ekslernantoj de la « Supra Lernejo de Komercio, en Lille kunvenis ĉe la restoracio Divoir por monata vespermanĝo. S^o Emile Rouzé, el Malo-les-Bains, paroladis kun granda sukceso pri la « Historio de diversaj helpaj lingvoj kaj precipe pri Esperanto ». Tiam unu membro de la kunveno proponis akceptigi Esperanton, kiel devan lingvon en la Supra Lernejo de Komercio en Lille. Tiu propono estas nun en tre bona vojo.

El Hispanujo. — Ni ekscias, ke antaŭ kelkaj monatoj oni fondis societon, kies nomo estas « Grupo Esperantista Barcelona ». Prezidanto estas S^o Alfonso Sabadell, konsulo esperantista en Barcelona, kaj sekretario S^o Juan Chaves.

Grupoj Esperantistaj fondiĝis en *Villanueva y Geltrú, Castillo de Locubín, Vitigudino, Alicante kaj Tarragona*.

Laŭ propono farita al la Hispana Societo por propagando de Esperanto, la hispanaj Esperantistoj plej entuziasme laboras, por ke baldaŭ okazu Kongreso de Esperanto en Hispanujo. Ĉar la kvara kongreso estos verŝajne en Germanujo, oni povas esperi, ke la kvina okazos en ia el la urboj Valencio, San Sebastian, Bilbao, kiuj ĝis nun pretendas la honoron akcepti la tutmondajn kongresanojn en 1909. — V. I.

El Svisujo. — Ĝenerala kunveno de svisaj Esperantistoj okazis en Neuchatel, la Paskan lundon.

La ĝenerala kunveno havis lokon en la ĉambrego « Aula » de la akademio, la plej grava rezultato estas la kreo de diplomo de profesoro de Esperanto de la S. E. S.

El Unuigitaj Ŝtatoj. — Internacia Paca Kongreso okazis en New-York kaj daŭris unu semajnon. Ĉe tiu fame konata kunveno ĉeestis S^{oj} W. T. Stead (angla) kaj Maorten Martens (rusa). — E. K. H.

Le gérant : CH. SCHIFFER.

ALIĜILO

AL LA TRIA KONGRESO DE ESPERANTO

~~~~~

Mi petas, ke **LA TRIO por LA TRIA** en-  
skribos la apudajn nomojn sur la nomaron de {  
la Kongresanoj. Mi kunsendas { *papermonon* }  
                                                        { *poŝtmandaton* }  
                                                        { *poŝtmarkojn* } {

(*Kongresa bileto kostas* : Ŝ. 10; Fr. 10; M. 10; Kr. 10; Rub. 5; Fl. 5; \$ 2 1/2, k. t. p. —  
Personoj malpli ol 17-jaraj pagas nur 1/4. — Se bileto estas mendita antaŭ Junio 15, la Kon-  
gresna Libro estos sendata senpage.)

Pri la loĝado, k. t. p....

(1) Mi deziras lui ..... dormoĉambrojn por ..... personoj en hotelo, por  
kiuj mi estas preta pagi ..... frankojn ĉiunokte (*kosto inter* Fr. 4-8).

— aŭ (2) Mi deziras aĉeti biletaron (kosto : Fr. 45; £ 4-6-0) por septaga dormo-  
ĉambro kun salono kaj frua matenmanĝo en domo rekomendita de LA TRIO,  
kvin tagmanĝoj kaj kvin vespermanĝoj en la « Corn Exchange »<sup>1</sup>.

— aŭ (3) Mi deziras lui ..... dormoĉambrojn por ..... personoj kaj salonon en  
loĝeja domo rekomendita de LA TRIO, kaj mi estas preta pagi ĝis ..... frankoj  
por la semajno aŭ ..... frankoj ĉiutage (*ĉirkaŭ* Fr. 25; £ 1, po semajno).

Por helpi vian organizan penadon, mi havas plezuron sciigi al vi, ke :

Mi parolas la lingvojn .....

Mi estas membro de la specialistaj societoj pri .....

je kies kunsidoj mi deziras partopreni.

Mi restos en Kembriĝ de Aŭgusto ..... ĝis ..... (post la finiĝo de la oficiala  
Kongreso je Aŭgusto 17, oni faros aranĝojn en Londono, kiujn mi esperas ĉeesti).

Mi ĝojos renkonti samprofesianojn aŭ samtitolulojn dum mia restado en Kem-  
briĝ, kaj mia profesio<sup>2</sup>, metio, okupado kaj titoloj estas .....

Mi petas, ke vi bonvolu sendi al mi, tuj kiam definitive aranĝita, liston de la  
proponitaj ekskursoj dum kaj post la Kongreso, por ke mi faru elekton inter ili,  
kaj ankaŭ ke vi sendu kun la kongresa bileto, kiam preta, ateston pri membr-  
iĝo, kiu rajtigos min ricevi fervojojn rabaton.

Mi profitas tiun ĉi okazon por mendi ankaŭ la sekvantajn el la Eldonaĵoj de  
la Kongreso :

- ..... ekzempleroj de *Kongresa ilustrita Poŝtkarto* (Fr. 0,70 la dekduo)
- ..... — *Muzikaj Poŝtkartoj* (Fr. 0,50 la dekduo)
- ..... — *Alglueblaj Markoj* (Fr. 1 por 50)
- ..... — la ludota komedio : *Boks kaj Koks* (Fr. 0,70)
- ..... — — el *Pickwick* (Dickens) (Fr. 0,70)
- ..... — *Paper-flaĝetoj esperantaj* (Fr. 0,70 por 10).
- ..... — *Angla Eklezia Diaservo* 25 himnoj (Fr. 0,70).

Mi estas, Sinjoroj, via samideano,

Nomo .....

Konstanta adreso .....

Dato .....

1. De dimanĉa vespermanĝo ĝis vendreda tagmanĝo.

2. Se profesoro aŭ instruisto, volu aldoni ankaŭ pri kiu fako vi instruas.

---

Oni plenigu tiun paĝon, elstrekite la neutilajn frazojn, kaj sendu ĝin  
kiel eble plej baldaŭ al **Triano H. B. Mudie,**

**KONGRESO**, 2, Kings Parade, **Cambridge** (England).



# Verkaro de D<sup>ro</sup> L. L. ZAMENHOF

*Aĉetebla ĉe ĉiuj eldonistoj de « La Revuo »*

---

## Ĉiu Esperantisto

devas nepre posedi la verkojn de nia Majstro !

### FUNDAMENTO DE ESPERANTO :

|                                                              |         |
|--------------------------------------------------------------|---------|
| Eldono Franca, Angla, Germana, Rusa, Pola (bindita). . . . . | Fr. 3 » |
| (La sama, broŝurita) . . . . .                               | — 2 »   |
| Eldono Hispana . . . . .                                     | — 1 »   |
| — Itala (en presado) . . . . .                               | — 1 »   |
| — Greka (en presado) . . . . .                               | — » »   |
| — Rumana (en preparo) . . . . .                              | — » »   |

*Oni vendas aparte :*

|                                           |          |
|-------------------------------------------|----------|
| EKZERCARO (kvinlingva). . . . .           | Fr. » 75 |
| UNIVERSALA VORTARO (kvinlingva) . . . . . | — 1 »    |

### WÖRTERBUCH DEUTSCH-ESPERANTO

Dua eldono. Revidita, korektita, pliigita ! Ĝi estas la vera komplemento de **Universala Vortaro**.

|                                     |            |
|-------------------------------------|------------|
| Unu volumo, in-8, 178-paĝa. . . . . | { Mk. 2 »  |
|                                     | { Fr. 2,50 |

### FUNDAMENTA KRESTOMATIO

Plej grava verko, kiun ĉiu devas legi por akiri perfektan stilon.

|                                                  |          |
|--------------------------------------------------|----------|
| Unu volumo, in-8, 550-paĝa (broŝurita) . . . . . | Fr. 3,50 |
|--------------------------------------------------|----------|

### HAMLETO

Tragedio en kvin aktoj de SHAKESPEARE.

|                                                  |         |
|--------------------------------------------------|---------|
| Unu volumo, in-8, 176-paĝa (broŝurita) . . . . . | Fr. 2 » |
|--------------------------------------------------|---------|

### LA REVIZORO

Komedio en kvin aktoj de N. V. GOGOL.

|                                                  |          |
|--------------------------------------------------|----------|
| Unu volumo, in-8, 100-paĝa (broŝurita) . . . . . | Fr. 1,50 |
|--------------------------------------------------|----------|

### LA PREDIKANTO

Libro el « LA BIBLIO ».

|                           |          |
|---------------------------|----------|
| Broŝuro 28-paĝa . . . . . | Fr. 0,75 |
|---------------------------|----------|



NOVAJ ELDONOJ  
DE LA  
ELDONISTOJ DE “ LA REVUO ”

---

ĴUS APERIS :

**Fundamento de Esperanto** de D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof,  
eldono *itala*, tradukita de S<sup>ino</sup> ROSA JUNCK (*Hachette et C<sup>ie</sup>, Paris*).  
1 vol. in-8, 96-paĝa (*broŝurita*). . . . . Fr. 1 »

---

**La Predikanto** libro el la Biblio, tradukis D<sup>ro</sup> L. L. Zamenhof (*Hachette et C<sup>ie</sup>, Paris*).  
Broŝuro 28-paĝa. . . . . Fr. 0,75

---

**Internacia Krestomatio** elektis kaj tradukis D<sup>ro</sup> Kabe (*Arct, Warszawa*).  
1 vol., in-8, -432paĝa (*broŝurita*) . . . . . Fr. 1,25

BALDAŬ APEROS :

**Vocabulaire Technique  
et Technologique**  
(Français-Esperanto) de Ch. VÉrax (*Hachette et C<sup>ie</sup>, Paris*).  
1 vol. in-8, 432-paĝa . . . . . Fr. » »

---

**Imenlago** romano de Theodor Storm, tradukita el la germana lingvo de Alfred Bader (*Hachette et C<sup>ie</sup>, Paris*).  
1 vol. in-8, 33-paĝa (Kolekto de « LA REVUO »). . . Fr. » »

---

**Faraono** romano de Prus, tradukita el la pola lingvo de D<sup>ro</sup> Kabe (*Hachette et C<sup>ie</sup>, Paris*). Parto I.  
1 vol. in-8 (Kolekto de « LA REVUO »). . . . . Fr. » »

## Kolekto Esperanta Aprobata de D<sup>ro</sup> Zamenhof

Ĉiuj libroj de tiu kolekto estas aĉeteblaj ĉe la firmoj montritaj sur la kovrilo de La Revuo

FRANCUJO. — HACHETTE kaj K<sup>o</sup>, 79, boul. St-Germain, Paris

### LERNOLIBROJ POR FRANCOJ

|                                                                                                                                |      |
|--------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------|
| Corrigé de l'Ekzerco du D <sup>r</sup> ZAMENHOF, par L. de Beaufront . . . . .                                                 | » 60 |
| Grammaire et Exercices de la langue Esperanto, par L. de Beaufront. . .                                                        | 1 50 |
| Corrigé du précédent, par L. de Beaufront. . . . .                                                                             | » 75 |
| Commentaire sur la grammaire Esperanto, par L. de Beaufront. . . . .                                                           | 2 »  |
| Texte synthétique, par L. de Beaufront. . . . .                                                                                | » 50 |
| Thèmes d'application, par L. de Beaufront. . . . .                                                                             | 2 »  |
| Cours commercial d'Esperanto, par Marissiaux. . . . .                                                                          | 1 50 |
| Corrigé du précédent, par Marissiaux. . . . .                                                                                  | 1 »  |
| L'Esperanto en dix leçons, par Th. Cart et Pagnier. . . . .                                                                    | » 75 |
| Corrigé du précédent, par Th. Cart et M. Procureur . . . . .                                                                   | » 50 |
| Premières leçons d'Esperanto, par Th. Cart. . . . .                                                                            | » 30 |
| Dictionnaire Esperanto-Français, par L. de Beaufront. . . . .                                                                  | 1 50 |
| Structure du dictionnaire Esperanto, par L. de Beaufront. . . . .                                                              | » 30 |
| Vocabulaire Français-Esperanto et Vocabulaire abrégé Esperanto-Français,<br>par Th. Cart, M. Merckens et P. Berthelot. . . . . | 2 50 |
| Vocabulaire des mots spéciaux à la philatélie, par R. Lemaire. . . . .                                                         | » 40 |

### TEKSTOJ EN ESPERANTO

|                                                                                                             |      |
|-------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------|
| Brueys et Palaprat. <i>Advokato Patelin</i> , tradukita de J. Evrot. . . . .                                | » 75 |
| Diversaĵoj, rakontetoj tradukitaj de S <sup>oj</sup> Lallemand kaj Beau. . . . .                            | 1 25 |
| Ekzercoj de Aplikado, de L. de Beaufront. . . . .                                                           | 1 »  |
| Esperantaj prozaĵoj, de diversaj aŭtoroj. . . . .                                                           | 2 50 |
| — — (1 <sup>a</sup> parto), (Rakontoj kaj Fabeloj). . . . .                                                 | » 25 |
| Godineau. <i>La Kolorigisto-aerveturanto</i> . . . . .                                                      | » 30 |
| Komercaj leteroj, de P. Berthelot kaj Ch. Lambert. . . . .                                                  | » 50 |
| Kondukanto de l' interparolado kaj korespondado kun aldonita Antologio<br>Internacia, de Grabowski. . . . . | 2 »  |
| Kurso tutmonda, de E. Gasse. . . . .                                                                        | » 75 |
| Labiche et Legouvé. <i>Cikado ĉe Formikoj</i> , unuakta komedio. . . . .                                    | » 60 |
| La Fontaine. <i>Elektilaj Fabeloj</i> , esperantigitaj de G. Vaillant. . . . .                              | » 75 |
| La Komerca sekretario, de Ros Sudria. . . . .                                                               | » 50 |
| Leibniz. <i>Monadologio</i> , tradukita de E. Boirac. . . . .                                               | » 60 |
| Maistre (X. de). <i>Vojaĝo interne de mia Ĉambro</i> , tradukita de S. Meyer. . . .                         | » 75 |
| Matematika terminaro kaj krestomatiko, de R. Bricard. . . . .                                               | » 75 |
| Molière. <i>L'Avarulo</i> , tradukita de S. Meyer. . . . .                                                  | » 75 |
| — <i>Don Juan</i> , kvinakta komedio (1665) tradukita de E. Boirac. . . . .                                 | 1 50 |
| Orszesko. <i>La interrompita kanto</i> , tradukita de Kabe. . . . .                                         | » 75 |
| Perrault (Ch.). <i>Rakontoj pri Feinoj</i> , tradukitaj de Sinjorino Sarpy. . . . .                         | 1 »  |
| Pola Antologio, elektis kaj tradukis Kabe. . . . .                                                          | 2 »  |
| Poŝlibro por Aferistoj, Turistoj, k. c. <i>Norman</i> . . . . .                                             | 2 »  |
| Sieroŝevski (Vaclav). <i>La Fundo de l'mizero</i> , tradukita de Kabe. . . . .                              | » 75 |
| Verkaro. <i>Devjatnin</i> . . . . .                                                                         | 2 »  |
| Virgilio. <i>Eneido</i> , kantoj I-XII, tradukita de D <sup>ro</sup> Vallienne. . . . .                     | 3 »  |

### DIVERSAJ VERKOJ

|                                                                                                                  |      |
|------------------------------------------------------------------------------------------------------------------|------|
| Premier manuel de la langue auxiliaire Esperanto . . . . .                                                       | » 40 |
| Anatomia Vortaro (kvarlingva) verkita de la Medicina Esperantista Grupo. .                                       | 1 50 |
| Couturat (L.) et Leau (L.). <i>Histoire de la langue universelle</i> . . . . .                                   | 10 » |
| — Extraits de l'Histoire de la langue universelle . . . . .                                                      | 1 »  |
| Lafargue (G.). <i>Nécessité de l'adoption d'une langue internationale auxiliaire</i>                             | 1 »  |
| Ménil (F. de). <i>L'héritage Klodarec</i> , comédie en un acte, pour la propa-<br>gande de l'Esperanto . . . . . | » 75 |
| Sacré (E.). <i>L'Esperanto</i> . . . . .                                                                         | 1 »  |
| Thiaucourt (C.). <i>Dernière conférence sur la Langue Internationale Esper-<br/>anto</i> . . . . .               | 1 »  |

# GAZETOJ ESPERANTISTAJ

## I. — SPECIALAJ ĴURNALOJ

- Espero Katolika**, monata, malfermita por ĉiuj demandoj (escepte la politikaj); jare, Fr. 5, (en Francujo Fr. 4). Direktoro: P<sup>o</sup> EM. PELTIER, en Ste-Radegonde, Tours, (Indre-et-Loire) (Francujo).
- Esperanta Ligilo**, monata organo en reliefpunktoj por blinduloj; jare, Fr. 3. Ĉefredaktoro: TH. CART, 12, rue Soufflot, Paris V.
- Espero Pacifista**, monata organo de « Pacifisto » (Internacia Societo por la Paco); jare, Fr. 5, kun laŭvola enskribo en la societo. Direktoro: G. MOCH, 26, rue de Chartres, Neuilly-sur-Seine (Francujo).
- Ekspert-Jurnalo**, monata revuo por la komerco kaj industrio; jare Mk. 4, Fr. 5; Guttleutstrasse, 96, Frankfurt-a.-M. (Germanujo).
- Foto-Revuo**, monata gazeto fotografa, en Franc. kaj Esp. lingvoj; jare, Fr. 5; ĉe CHARLES MENDEL, 118, rue d'Assas, Paris.
- Idealo**, monata organo de « Sicilia Federacio Esperanta » de Federacio Esperanta « Malta Stelo » kaj de « La Fasko »; jare, (en Italujo) Fr. 2; (aliaj landoj) Fr. 3. Direktoro: VITANGELO NALLI, Corso Calatafimi, 495, Palermo.
- Internacia Scienca Revuo**, monata; jare, Fr. 7. Direktoro: R. DE SAUSSURE. Administracio: INTERNACIA SCIENCA OFICEJO, 8, rue Bovy-Lysberg, Genève.
- Internacia Socia Revuo**, monata; jare, Fr. 6, ĉintrimonate, Fr. 1,75. Administracio: S<sup>o</sup> R. LOUIS, 45, rue de Saintonge, Paris III.
- Juna Esperantisto**, monata gazeto por junuloj, instruistoj kaj Esperanto-lernantoj, 8 paĝoj (18 × 22), nur en Esperanto. Jara abono: Fr. 2,50. Administracio: PRESA ESPERANTISTA SOCIETO, 33, rue Lacépède, Paris.
- Lingvo Internacia**, monata organo, 48 paĝoj (13 × 20), nur en Esperanto; jare, Fr. 5, kun aldono literatura, Fr. 7,50. Administracio: *Preso Esperantista Societo*, 33, rue Lacépède, Paris.
- Tra la Mondo**, tutmonda revuo esperanta, *multilustrata*; jare, Fr. 8, kvaronjare, Fr. 2,25, unu numero 75 centimoj. Sin turni al ADMINISTRANTO DE TRA LA MONDO, 15, boulevard des Deux-Gares, Meudon (S.-et-O.), Francujo.

## II. — NACIAJ PROPAGANDAJ ĴURNALOJ

- Belujo**: **La Belga Sonorilo**, oficiala monata organo de la B. L. E., en Franc., Flandr. kaj Esp. lingvoj; jare, Fr. 4. Kolektoj de 1<sup>a</sup> k. 2<sup>a</sup> jaroj, Fr. 6; de 3<sup>a</sup> k. 4<sup>a</sup> jaroj, Fr. 7. Abonoj komenciĝas de 1<sup>a</sup> de Sept<sup>o</sup>; ĉe J. COOX en Duffel (Belujo).
- Bohemujo**: **Časopis Českých Esperantistů**, monata organo de l' Bohemoj, en Boh. kaj Esp. lingvoj; jare, Fr. 3,75, (en Aŭstrujo K. 3). Administracio: *Praha II*, 313.
- Brazilujo**: **Brazila Revuo Esperantista**, monata organo en Port. kaj Esp. lingvoj; jare Fr. 6. Redakcio: Rua da Assa nbléa, 46, Rio de Janeiro.
- Bulgariujo**: **Bulgara Esperantisto**, monata organo en Bulg. kaj Esp. lingvoj; jare: Fr. 1,50. Administracio: *Sofio*.
- Danujo**: **Esperanto-Bladet Helpa lingvo**, monata oficiala organo de la « Societo de Esperantistoj »; jare Kr. 1,20; ĉe: F<sup>oo</sup> G. MÜNSTER, 54 B. Kopenhago Ö.
- Francujo**: **L'Espérantiste**, oficiala monata organo de la S. F. P. E., en Franc. kaj Esp. lingvoj; jare, (en Francujo) Fr. 3, (aliaj landoj) Fr. 3,50; kun enskribo en la societo: Fr. 4. Direktoro: S<sup>o</sup> L. DE BEAUFONT, Louviers (Eure) (Francujo).
- Paris-Esperanto**, monata organo de l' Grupo Pariza, en Franc. kaj Esp. lingvoj; jare, Fr. 1,30. Sek.: V. CHAUSSEGROS, 3, Place Jussieu, Paris.
- Germanujo**: **Germana Esperantisto**, oficiala monata organo de la G. E. S., en Germ. kaj Esp. lingvoj; jare, Mk. 3 (Fr. 3,75). Oni abonas ĉe ESPERANTO VERLAG MÖLLER & BOREL, 95, Prinzenstrasse, Berlin, kaj ĉe HACHETTE & K<sup>o</sup>, Paris.
- Granda Britujo**: **The British Esperantist**, oficiala monata organo de B. E. A. en Angl. kaj Esp. lingvoj; jare, §. 1 p. 6 (Fr. 2); kun aldono, §. 3 (Fr. 4). Oni abonas ĉe la Sekretario de la B. E. A., 13, Arundel Street, Strand, London.

(Vidu la sekvantan poŝon.)



# GAZETOJ ESPERANTISTAJ

## II. — NACIAJ PROPAGANDAJ JURNALOJ (sekvo)

- Hindujo* : La Pioniro, en Angl. kaj Esp. lingvoj; monate, p. 4 (Fr. 0,45). Administracio : HON<sup>r</sup> SER<sup>r</sup> DE LA KOLAR GOLD FIELD, *Marikuppan*, Mysore State, South India.
- Hispanujo* : La Suno Hispana, oficiala monata organo de la H. S. P. E. en Esp. kaj Hisp. lingvoj; jare, Fr. 3. Direktoro-Administranto : A. JIMENEZ LOIMA, Avellanias 11, *Valencia*.
- Hungarujo* : Esperanto, en Hung. kaj Esp. lingvoj; jare (ten Hingarujo) Kr. 3; (aliaj landoj) Kr. 3,80. MARICH AGOSTON, Ŭlloi-ŭl 59., IV. 8., IX, *Budapest*.
- Perujo* : Antaŭen Esperantistoj, en Hisp. kaj Esp. lingvoj; jare, Fr. 3. Redaktoro, FEDERICO VILLAREAL. Administracio : Apartado 927, *Lima*.
- Rusujo* : Ruslanda Esperantisto, oficiala monata organo de « Espero », en Rus. kaj Esp. lingvoj; jare, R. 3 (Fr. 8.); ĉe S<sup>ro</sup> ESPERO, B. Podjaĉeskaja 24, *St-Peterburgo*.
- Svedujo* : Esperantisten, en Sved. kaj Esp. lingvoj; jare, Kr. 2,50 (Fr. 3,50). P. AHLBERG, 37, Surbrunnsgatan, *Stockholm*.
- Svisujo* : Svisa Espero, en Esp. oficiala organo de la S. E. S.; jare, Fr. 2,50, sin turni al S<sup>ro</sup> TH. RENARD, 6, Vieux Collège, *Genève*.
- Unuigitaj Ŝtatoj* : L'America Esperantisto, en Angl. kaj Esp. lingvoj; jare, \$ 1 (Fr. 5); ĉe AMERIKA ESPERANTISTO, *Oklahoma City* (Unuigitaj Ŝtatoj).  
The American Esperanto Journal, oficiala monata organo de « American Esperanto Association »; jare, \$ 1; kun enskribo en la societo, \$ 1,50. Administracio : STEPHEN W. TRAVIS, JR., 349, Etna Street, *Brooklyn N. Y.*

Libreiro HACHETTE & K<sup>o</sup>, 79, Boulevard Saint-Germain, PARIS

# Tutmonda Jarlibro Esperantista 1906

Enhavanta la adresaron de D<sup>ro</sup> ZAMENHOF

Tiu ĉi jarlibro eldoniĝas ĉiujare dum Marto. Ĝi entenas : pli ol 30.000 adresojn de Esperantistoj de l' tuta mondo, plenajn sciigojn pri la propagandaj Societoj, pri la libroj, la gazetoj, la ĉiuspecaj eldonaĵoj en Esperanto.

Unu volumo, in 16, broŝurita . . . . . Fr. 3,50

## BILDAROJ

Teksto en Esperanto — 25 malsamaj numeroj

Tiaj Bildaroj kvankam skribitaj por infanoj taŭgas perfekte por la novaj adeptoj. Per ili la profesoroj povas rapide kutimigi la lernantojn paroli esperante. Ili utilis ankaŭ por la propagando.

Gepatroj, Profesoroj, Propagandistoj ! Aĉetu kaj konigu la BILDAROJN.

|                           |   |                                   |          |
|---------------------------|---|-----------------------------------|----------|
| Prezo, Seto da 25 numeroj | { | Francujo kaj kolonioj, . . . . .  | Fr. 1.50 |
|                           |   | — per poŝto simpla . . . . .      | 1.65     |
|                           |   | Aliaj landoj . . . . .            | 2        |
|                           |   | — per poŝto rekomendita . . . . . | 2.40     |

Specialaj prezoj por la Grupoj.

Jus Aperis.

# LA KANTO DE L' CIGNO

## MELODIO

Poemo de SVIRIDOV — Muziko de F. de MENIL

Kanto kun fortepiano. Prezo : Fr. 1.

Coulommiers. — Imp. PAUL BRODARD.

